

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto



2011

10

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2011. №10 (204)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Andrej Peĉonkin, Sergio Pokrovskij, Serge Sire, Andrzej Sochacki

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2012

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 590 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 23a paĝo.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 550 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2011.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2011, №10 (204).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 19 сентября 2011 г.

Цена свободная. Тираж: 550 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Redakcie

Oni diras, ke la longe atendataj monentoj venas surprize. Tio reprovigis en nia kazo... Kiel kutime, je kvarono post la unua nokta horo sabata, la 10an de septembro, ni ankoraŭ ne dormis (mia labortago, sojle de la semajno, kiam *La Ondo* estas preparata, estas jam 18-hora, ekde la 9a matene ĝis la 3a nokte). Subite sonoris la poŝtelefono de Halina. Vira voĉo demandis:

— Ha lo! Ĉu Halina?

— Mi estas...

— Antaŭ kelkaj horoj ni ricevis renon, kiu, laŭ la ĉefaj kriterioj en nia komputila bazo, plej taŭgas ĝuste por vi. Ĉu vi estas preta al grefta operacio?

Halina senhezite deklaris sian pretecon, kaj frumatene ni iris metroe al la Scienc-esplora instituto de greftado kaj artefaritaj organoj Ŝumakov. Post tri horoj da pliaj esploroj kaj analizoj, je 10h40m la operacio komenciĝis. Ĝi daŭris ĉirkaŭ kvin horojn. Post 20 horoj da postoperacia restado en reanimejo, Halina estis venigita en hospitalan ĉambron, kie, se ĉio iros plu glate, ŝi pasigos tri, kvar aŭ kvin semajnojn. Ŝia sano kontentige progresas, kaj ni esperas, ke baldaŭ ni forlasos Moskvon kaj la 6an de novembro festos la naskiĝdatrevenon de Halina en nia Kaliningrada loĝejo, kiu ni ofte sopiris dum nia Moskva atendado.

Ĉi tiu “aventuro”, kiel kelkaj nomas ĝin, komencita fine de la pasint-jara aŭgusto, ne finiĝus sukcese, kaj ni devus rezigni, se ni ne ricevus grandan subtenon de la esperantistaro, kiu ebligis al ni transvivi la plej komplikitan periodon en nia vivo. Koran dankon al ĉiuj kiuj subtenis finance, al ĉiuj kiuj bondeziris, al ĉiuj kiuj preĝis por Halina!

Nia filo Aleksej, senprokraste venis per aviadilo (la reguloj de EU postulas 26-horan atendadon post la aĉeto de fervoja bileto el Kaliningrado al Ruslando, dum kiu Litovij diplomatoj devas (mal)aprobi tiun vojaĝon), kaj li dum unu semajno helpis Halinan en la hospitalo, dum mi plejparte okupiĝis pri ĉi tiu *Ondo*. Li ankaŭ pendolis inter la hospitalo kaj nia luata loĝejo, ĉiutage farante unu aŭ du trihorajn tien-reenajn vojaĝojn.

Dum la febraj horoj ni ne povis adekvate zorgi pri la revuo, kaj mi, la redaktulo, petas vian pardonon pro tio, ke ĉi tiu kajero estas nekutime ĥaosa. Ekzemple, mankas en ĝi la listoj de la ricevitaj libroj kaj gazetoj, mankas nova konkurstasko kaj la solvoj de la antaŭa, mankas la listo de donacoj al la fondaĵo, kiu *reale savis* la vivon de Halina.

Mi ankaŭ petas, ke pardonu min miaj konatoj kaj amikoj en Belorusio kaj Litovio, kiuj helpis ĉe planado de mia septembrofina esplorvojaĝo — mi nepre venos iam dum la vintro. Krome, la unuan fojon ekde nia ekloĝo en la urbo de Kantio, nek mi, nek Halina partoprenas ĉi-jare nian amatan ARKONES, kaj nia filo anstataŭas nin en Poznano.

Pro la nomitaj perturboj mi ne povis labori sufiĉe zorge pri movadaj informoj, kaj ĉi-foje la rubriko *Eventoj* okupas nur kvar paĝojn. Kompense enestas kelkaj longaj tekstoj, interalie pri kino kaj pri muziko. Kaj nian kovropaĝon ornamas foto, sur kiu vi vidas la majstron Georgo Brassens kaj lian lernanton Jakvo Yvart (nu, lian dorson), kiu kontribuis ĉi-foje eseeton pri la plej fama postmilita kanzonisto, kies du jubileojn ni rememoras ĉi-oktobre. (*Dankon al Birgit pro la disponigita foto.*)

Aleksander Korĵenkov

Kio estas ESF, kaj kial ĝi subtenindas?

“Ĉu eblas la mondo, kie multaj lingvoj, grandaj kaj malgrandaj, kunekzistas en relativa egaleco, kaj kie komunikado je tutmonda skalo estas egale alirebla kaj por riĉuloj kaj por malriĉuloj?”

La supra frazo estas la devizo de Esperantic Studies Foundation (ESF; Fondaĵo por esperantaj studoj). Malmultaj esperantistoj aŭdis la nomon de ESF. Sed eble vi iam uzis lernu.net aŭ edukado.net. Eble vi aŭdis pri *Springboard to Languages* (Lingvo-saltilo) aŭ pri la laboro de Renato Corsetti pri la trejnado de instruistoj en Afriko. Aŭ povus esti, ke iam vi spektis la instruan filmon *Pasporto al la Tuta Mondo* aŭ la informfilmon *Esperanto estas...*, aŭ eble vi spektis dokument-filmon pri Esperanto de Sam Green. Eble vi iam traserĉis la korpuson tekstaro.com por trovi la historian uzon de iu vorto, aŭ aŭdis pri la plurjara laboro de UEA por konservi la enhavon de Biblioteko Hodler. Se vi faris tiujn aferojn, vi povas danki al ESF, ĉar tiuj projektoj ne povus ekzisti sen la financa subteno de ESF. Ĉiuj el tiuj projektoj (kaj multaj aliaj) ricevis gravan financon subtenon de ESF.

Ĉiuj tiuj projektoj estis realigitaj dum la lasta jardeko, sed ESF ekzistas ekde 1968. Rakontas E. James Lieberman, unu el la fondintoj de ESF: “Humphrey Tonkin, Jonathan Pool kaj mi estis la fondinta triopo de ESF en 1968. Tra 30 jaroj (dume aliĝis David Jordan kaj Mark Fettes) ni eldonis raportojn kaj novaĵleteron por informi lingvistojn kaj edukistojn pri la ekzisto de Esperanto kaj ĝia merito kiel science esplorinda afero”.

Per la subvencio de sciencaj studoj kaj edukaj projektoj, ESF celas plibonigi komprenon de Esperanto mem, plibonigi instruadon kaj lernadon de Esperanto en Nord-Ameriko kaj tutmonde, kaj plibonigi komunikadon inter esploristoj kaj edukistoj, kiuj interesiĝas pri interlingvaj temoj.

En la pasinteco ESF plejparte

plenumis sian laboron per subtenado de sciencaj esploroj kaj Esperanto-kursoj en Nord-Ameriko. ESF donacis monon al esploristoj, kiuj studis Esperanton kaj interlingvistikajn temojn, kaj subtenis komunikadon inter tiuj esploristoj. Delonge ESF subtenas la Nord-Amerikan Someran Kursaron (NASK), Usonan Esperanto-kursaron, kiu okazas ĉiusomere ekde 1970.



ESF ankoraŭ subvencias esploristojn kaj Esperanto-kursojn, sed multajn jarojn post la fondiĝo de ESF la mondo ŝanĝiĝis. Aperis interreto, kaj en 1999 ESF ricevis grandan monsumon per la testamento de Bill kaj Catherine Schulze, konataj Usonaj esperantistoj. ESF subite povis subteni multajn projektojn, kiuj estus nepenseblaj nur kelkajn jarojn antaŭe, pro la novaj teknologiaj kaj financaj rimedoj disponeblaj al ĝi.

En 2002 naskiĝis lernu.net, kiu nun estas la plej granda Esperanto-komunumo en la mondo. D-ro Lieberman, kunfondinto de ESF, rakontas ke “Niaj laboroj havis malgrandan efikon ĝis la Interreto, kiam, per lernu.net, io grava naskiĝis”. Lernu.net estas senpaga paĝaro, kiu ofertas multege da lerniloj kaj aliaj rimedoj al siaj lernantoj; senpaga, kio tamen ne signifas senkosta. Lernu.net ricevis financon subtenon de ESF dum ĉiuj naŭ jaroj de ĝia ekzisto, sume pli ol 280 mil eŭrojn. Laŭ Lieberman, “danke al la subteno de Bill kaj Catherine Schulze, ESF povis fari tion”.

Danke al la subteno de ESF, lernu.net kreskis al komunumo de pli ol 103 mil uzantoj. La paĝaro estas tradukita en 37 lingvojn. Kvankam la

moderna Esperanto-movado estas grandparte centrita en Eŭropo, kaj kvankam plej multaj *lernu!*-uzantoj (pli ol 48 mil) ja loĝas en Eŭropo, *lernu!* havas pli ol 2600 uzantojn en Afriko, pli ol 3000 en Oceanio, pli ol 11.500 el Azio, kaj pli ol 35.000 el Ameriko. Preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo estas reprezentitaj en la *lernu!*-uzantaro. Estas *lernu!*-uzantoj el Birmo, Afganoj kaj Reunio (insuleto en la Hinda oceano); estas *lernu!*-uzantoj en Turkmenujo, en la Palestinaj Teritorioj kaj en Bocvano. Estas *lernu!*-uzantoj en amaso da landoj, kiuj ne havas Esperanto-asocion. Tiuj lernantoj ne havas instruistojn pri Esperanto, sed pere de interreto, *lernu!* portas senpagajn Esperanto-kursojn al iliaj hejmoj.

Por festi la registriĝon de la 100.000a uzanto de lernu.net, *lernu!*-teamo kunlabore kun E@I lanĉis donac-kampanjon por subteni ESF. La celo estas kolekti 100.000 eŭrojn por ESF antaŭ la 15a de decembro 2012. Sen ESF Esperantujo ofertus malpli da servoj al esperantistoj kaj al tiuj, kiuj volas lerni Esperanton, kaj estas deziro helpi al ESF daŭrigi sian bonan laboron. Tio estas tre ambicia tasko, sed ĝi povas esti realigita, se multaj esperantistoj subtenos tiun iniciaton. Speciale por tiu ĉi kampanjo estis funkciigita aparta retpaĝo <http://kampanjo.ikso.net>, ĉe kiu eblas trovi detalajn informojn pri la kampanjo kaj pri la ebloj donaci.

Pli da informoj vi trovos ĉe <http://kampanjo.ikso.net>.

Erin Piatetski

lernu!-teamano kaj E@I-aktivulo

En nia retejo *La Balta Ondo* <http://sezonoj.ru/> kaj en la blogo de E@I <http://blog.ikso.net/> krom la supre presita artikolo de Erin Piatetski aperis ankaŭ esprimoj de subteno por la donac-kampanjo de diversaj esperantistoj, kiuj ricevis helpon de ESF por siaj projektoj: Marek Blahuš, Detlev Blanke, Renato Corsetti, Mark Fettes, Katalin Kováts, Hakan Lundberg, Humphrey Tonkin.

UEA aktivis ĉe UN-Konferenco

(GK UEA) Kvin reprezentantoj de UEA partoprenis la 64an Konferencon de Neregistaraj Organizaĵoj, kiun la Departemento pri Publika Informado de Unuiĝintaj Nacioj okazigis 3–5 sep en Bonn (Germanio). Tiu ĉi plej grava ĉiujara evento de UN por NRO-j havis la temon *Daŭrigeblaj socioj — respond-ejcaj civitanoj*.

La delegitoj de UEA (Marcos Cramer, Stefano Keller, Mélanie Maradan, Julia Noe kaj Manfred Westermayer) dum la konferenco havis multajn okazojn por interparoli kun reprezentantoj de aliaj NRO-j kaj interŝanĝi ideojn, informilojn kaj kontaktkartojn. La teamo de UEA aktive diskonigis la starpunktojn de UEA pri lingvaj rajtoj, komentante, interalie, tion, ke nur la angla estis laborlingvo de la konferenco.

Dum unu el la rond-tablaj diskutoj Stefano Keller revenis al la afero post parolado de reprezentanto de *PepsiCo*, kiu prezentis la klopodojn de sia firmao subteni la evoluon en la diversaj mondopartoj, kie ĝi fabrikas kaj vendas siajn varojn. Keller demandis, ĉu *PepsiCo* povus per subvencio ebligi ankaŭ uzon de aliaj oficialaj lingvoj de UN ol nur de la angla ĉe similaj konferencoj, se ĝi jam faras tiom vastan “homhelpan” laboron. La estrarano de UEA ricevis la respondon, ke pri tio oni skribu al la oficejo de *PepsiCo*. La sama respondo venis ankaŭ al lia demando, ĉu la firmao, kiu ĉeestas en tiom da lingvoregionoj, ne povus meti ankaŭ Esperantajn vortojn sur siajn varojn.

La delegitoj de UEA ĉeestis kelkajn laborgrupojn, kie ili aldonis al la diskutoj menciojn pri la neceso konsideri la rajton de ĉiu popolo je uzo de sia gepatra lingvo kaj je plukultivado de sia kulturo.

Jam komence de la konferenco estis publikigita malneta projekto de la fina deklaro, pri kiu la ĉeestantaj NRO-j povis komenti kaj fari proponojn pri ŝanĝoj kaj aldonoj. La teamo de UEA proponis aldonon de frazoj pri lingva diverseco kaj lingvaj rajtoj, pri kiuj la tekstoprojekto tute silentis.

Lastatage oni prezentis la finverkitan deklaron de la konferenco, en kiu mankis la mencioj pri lingvaj rajtoj proponitaj de UEA. Pri tiu ellaso Maradan protestis, kaj la propono de UEA estis enmetita en la definitiva deklaro, redaktita postkonferente de speciala komisiono.

Stefano Keller

300 esperantistoj en Greziljono

Preskaŭ tricent esperantistoj vizitis la Esperanto-Kulturdomon “Kastelo Greziljono” ĉi-somere. La Esperanto-Kulturdomo mem organizis kvar staĝosemajnojn kun meze dudeko da partoprenantoj kaj sep organizantoj, plejparte volontuloj.

Ĉiu semajno havis sian apartan temon: *pedagogio* inter la 17a kaj la 23a de julio (seminario “Esperanto en la oficiala instruado”, Esperanto-ekzamenoj...); *alternativa semajno*, samtempe kiel Universala Kongreso, kun vegetaraj menuoj, biciklado kaj prelegoj pri Barata alternativa kuracado; *turisma semajno* inter la 30a de julio kaj la 6a de aŭgusto, inkluzivanta ses ekskursojn al turisma ĉirkaŭaĵo kaj kurson pri franca lingvo por alilingvanoj; kaj *festa semajno* de la 15a ĝis la 24a de aŭgusto kun partopreno de tutaj familioj, distraj kaj artaj aktivaĵoj. Tiun ĉi vizitis 20 ĉinoj. Kompreneble okazis krome en ĉiu semajno du aŭ tri diversnivelaj kursoj pri Esperanto, aktivaĵoj (jogo, kanto, danco, teatro, bindado...).

Krom la 150 gastoj de niaj kvar semajnoj, cento partoprenis en FESTO, kunorganizita de JEFO kaj *Vinilkosmo* inter la 8a kaj la 15a de aŭgusto, kaj pli ol 30 en somera universitato de Eŭropo-Demokratio-Esperanto, inter la 2a kaj la 4a de septembro.

Sed por financi nian vastan programon pri renovigo de la kastelo, ni devis trovi ankaŭ neesperantistajn gastojn. Tial ni luigis la kastelon inter la 4a kaj la 17a de julio al somerferiado kun arta programo por dudeko da knabinoj, kaj inter la 25a de aŭgusto kaj la 1a de septembro al matematika asocio Animath, kiu devis elekti kvardekon el pli ol 150 kandidatoj por trejnado al Internacia Olimpiado pri Matematiko.

Tiu ĉi somero kuraĝigas nin por la jam komencitaj laboroj: aldoni de hejtiloj en ĉambroj, duŝoj, renovigo de la arboj, ktp. Eble baldaŭ nova ŝtuparo por la ĉambroj de la dua etaĝo?

François Lo Jacomo



Kun Zamenhof kontraŭ rasismo

(Libera Folio) La 4an de septembro laŭplane okazis en Bjalistoko manifestacio kontraŭ rasismo kaj antisemitismo; kaj “laŭplane” venis ankaŭ grupo de senkolaj, kalvaj friponoj por laŭte kriadi stultaĵojn.

Ĉe la monumento al Ludoviko Zamenhof proksimume 150-persona grupo de seriozaj demonstrantoj aplaudis la decidon de la friponoj forlasi nin. Forirante ili montris al ni pugnigitajn manojn, kaj ni laŭte ridegis. Okazis agrabla momento de vera venko.

La verdan standardon komence portis Aleksandro Sosna — prezidanto de Loka Kongresa Komitato de la 94a Universala Kongreso (2009) kaj honora membro de la Bjalistoka Esperanto-Societo; kaj poste eĉ pli alta ol li esperantisto, Konrado.

Inter ni estis la urbestro de Bjalistoko, parlamentanoj kaj multaj aliaj, ne nur bjalistokanoj. Ni lasis 50 flavajn rozojn ĉe la monumento al Ludoviko, kies ideoj daŭre restas aktualaj por normalaj homoj.

Ela Karczewska

UEA malfermas la pordon

La 35a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA la 26an de novembro atentis la 100-an datrevenon de Tibor Sekelj (1912–1988), pri kies multfaceta vivo prelegos la Esperanto-verkistino Spomenka Štimec.

La datreveno de Sekelj fakte estos en februaro, tiel ke la novembra Malferma Tago fariĝos enkonduko al la jaro, dum kiu okazos ankoraŭ multaj aliaj aranĝoj omaĝe al tiu fama mondvojaĝanto, ĵurnalisto, verkisto kaj movada aganto.

Alia temo de la Malferma Tago estos Vikipedio, pri kies evoluigo kaj utiligeblo parolos d-ro Ziko van Dijk. Ekde majo ĉi-jara li estas prezidanto de Wikimedia Nederland, la nederlanda filio de Fondaĵo Vikimedia kiu estras tiun ĉi liberan retan enciklopedion. En la posta tago en la CO okazos ankaŭ seminario por esperantistoj-vikipediistoj.

En la programo estos ankaŭ aliaj prelegoj, libroprezentoj kaj filmoj. La vizitantoj povos profiti de rabatoj en la libroservo kaj gajni esperantaĵojn en senpaga loterio.

Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La programo daŭros de la 10a ĝis la 17a horo.

GK UEA

Amasa kongreso en Italio

21–28 aŭg okazis en Torino la 78a kongreso de la italaj esperantistoj, al kiu aliĝis pli ol 280 personoj el 30 landoj. La urbo estis elektita por soleni la 150an datrevenon de la ekesto, ĝuste en Torino, de la itala regno; la kongresa temo tamen rilatis ne la pasintecon, sed la estontecon; la titolo estis “Kaj nun ni estu eŭropanoj”, kaj la sama temo estis proponita al la Eŭropa programo Grundtvig por vivo-longa lernado. Tio permesis ricevi Eŭropan subvencion, per kiu 20 eksterlandanoj ĝuis favoran kondiĉon por partopreno.

La kongresejo estis en bela vilao, speciale aranĝita por kunvenoj (tamen multaj esperantistoj devis loĝi ekstere). En la solena inaŭguro la festparoladon faris la prezidanto de UEA, Probal Dasgupta, pri temo liganta Eŭropon al lia lando, Barato: la traduko al la bengala lingvo de itala libro por geknaboj helpe de Esperanta traduko: ankaŭ tio estis subvenciita de Eŭropa Unio per alia kultura programo.

Kiel iĝis kutimo en la lastaj jaroj, la organizaj laboroj (jarkunsidoj de Itala Esperanto-Federacio kaj de ties fakaj sekcioj) estis nur parto de multe pli larĝa programo dediĉita al vizitoj de la urbaj vidindaĵoj, tuttagaj kaj duontagaj ekskursoj, kursoj pri Esperanto (je tri malsamaj niveloj) kaj itala lingvo, koncertoj, prelegoj, seminaĵaj diskutoj, filmoj, teatraĵoj, prezento de novaj libroj.

Unu seminario, sub la gvido de Bertrand Hugon, estis dediĉita al la kongresa temo, kun atento al la historio de la Eŭropaj instancoj kaj de demokratio en Eŭropo, al la sento de aparteno al Eŭropo kompare kun la sento de aparteno al la propra lando, al la kontribuo kiun povas doni la esperantistoj al Eŭropo. La seminarion kompletigis prelegoj de Katalin Kováts (la Esperantisto de la Jaro 2010) pri KER, la Eŭropa metodo por difini la konon de lingvo, de Davide Astori (ĉi-jare premiita en la Belartaj Konkursoj pro eseo pri Zamenhof) pri la Zamenhofa koncepto pri Eŭropo, debato pri “Lingvo: ĉu faktoro por unuecigo aŭ por divido”, ankaŭ kun kontribuo de Probal Dasgupta pri la lingva situacio en Barato kompare kun Eŭropo. La dua seminario, sub la gvido de Paul Gubbins, tuŝis temon ofte neglektatan, nome la Esperantan originalan teatron.

La teatro mem ne mankis en la programo, per *Dek tagoj de kapitano Postnikov* de Mikaelo Bronŝtejn, prezentita de la trupo da Saša Pilipoviĉ, kaj



La italaj Esperanto-kongresoj estas la plej amasaj en Eŭropo. Ankaŭ ĉi-jare la kongresanoj, venintaj el 30 landoj, plenis la kongresejon en Torino. (Fotis Ranieri Clerici)

Roma triptiko, inspirita de poemeto de papo Johano Paŭlo la 2a, prezentita de la pola trupo *Poetika Scenejo*. Ne mankis ankaŭ filmoj, la monda premiero de *Japana printempo* de Roman Dobrzyński (ankaŭ premiita en la Belartaj Konkursoj), kaj dokumentfilmoj pri Ukrainio de Tatjana Auderskaja. Ĉi-vespere, sur la bela teraso de la kongresejo kaj en la milda temperaturo de ĉi tiu somerfino, la kongresanoj povis ĝui koncerton de kantistoj kaj muzikistoj, jam konataj en la Esperanta mondo.

Nicola Minnaja

KELI: El Nederlando al Francio

La 61a kongreso de KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia) okazis 2–9 aŭg 2011 en la ĉeĥa kuraĉloko Poděbrady. Ĝi estis jubilea kongreso pro la centjariĝo de KELI. Pro la subita morto de nia estrarano kaj iama prezidanto Jacques Tuinder (10 jan 1933 – 18 jun 2011), kiun dum pli ol 40 jaroj inspiris Zamenhof kaj Jesuo batali per la organizo *Evidente* kontraŭ blindeco en la mondo, la kongreso estis ankaŭ nekrologe memoranta.

Kvindeko da personoj 5–93-jaraj el 13 landoj travivis bele organizitan kongres-semajnon preparitan admirinde de la sekretario Pavel Polnický. Surprizo estis la vizito de du indonezianoj dum du tagoj survoje hejmen post la UK.

Okazis festa malfermo en la urbo-doma salono kun partopreno de urbestro Dr. Ladislav Langr kaj sinoda senioro Joel Ruml. Ricevis donacojn pro demisioj el la estraro Els van Dijk (Nederlando) kaj Siegfried Krüger (Germanio) kiel kasisto. Ni partoprenis malfermon de la

ekspozicio en la urba muzeo “Ĉu Esperanto estas morta lingvo?” kun la partopreno de ĝia aŭtorino Pavla Dvořáková.

La kongresanoj loĝis en proksima hotelo, de kie ili post 10-minuta promonado laŭlonge de la rivero Elbo atingis la eklezian centron kun preĝejo. La manĝoj estis kunaj en la centro kaj en la manĝejo de proksima baneja domo.

La taga programo komenciĝis kun matena kaj finiĝis per vespera preĝo. Dum unu horo okazis komuna kantado uzante ADORU. La partoprenantoj kontribuis per diverstemaj prelegoj, ekzemple: “Heinrich August Luyken, verkisto kaj KELI-prezidinto” kaj “Gramatikaj obstakloj en Esperanto” (Ed Borsboom), “Kristana mistiko kaj kristanaj mistikuloj” (Siegfried Krüger), “Naskiĝo de baptismo en Ruslando” (Viktor Gromov), “Mihály Munkácsy – hungara pentristo” kaj “Ferenc Liszt – hungara komponisto” (Ágnes Ráczkevy Eötvös).

Okazis memora diservo pri Jacques Tuinder, kaj dulingva Diservo kun bapto kaj Sankta Manĝo kun la loka komunumo.

Ni spektis country-dancojn de loka grupo de pensiuloj, koncerton de lokaj gimnazianoj, vokalan grupon *Bluaj Floroj* kaj koncerton de operetaj kaj operaj kantoj kun Kateřina Kudlíková kaj Miroslav Smyčka en la pianakompano de Pavel Pichl. La programo enhavis multajn ekskursojn en la urbo kaj la regiono.

La jarkunveno de KELI decidis pri la nuligo de la Ligo en Nederlando kaj pri ĝia refondo en Francio, decidis pri statutŝanĝo, adiaŭis la longjaran sekretariinon el la estraro kaj elektis posteulon.

Siegfried Krüger
KELI estrarano



La mirinda MIRO

Ĉi-jara, la 12a MIRO (Mirinda Internacia Renkontiĝo) okazis dum la unuaj ses aŭgustaj tagoj en la belega kastelo en Stara Sušica, en la montara regiono de Kroatio.

Mi pensas, ke ni bone elektis la nomon de ĉi-jara renkontiĝo (ĉiufoje la “M” en la nomo de la renkontiĝo ŝanĝiĝas), ĉar mirinda estis ne nur la kastelo, sed ankaŭ la ĉirkaŭaĵo de la kastelo.

Ĉar la kastelo en Stara Sušica estas ĉirkaŭigita per montoj, arbaroj, herbejoj kaj riveretoj, la programo de la renkontiĝo baziĝis sur ekskursoj dum kiuj la partoprenantoj miru la mirindaĵojn de la ĉirkaŭaĵo.

La unuan tagon ni sukcese piediris 15 kilometrojn por viziti la belegan kanjonon Kamačnik. La duan tagon, kun la sama energio, ni grimpis al pinto Javorova Kosa de la apuda monteto kaj partoprenis la interesan okazaĵon Plodovi Gorja (Fruktoj de la montaro). Virino el la loka klubo estis nia gvidantino. Ŝi montris al ni la naturajn kaj homajn kreaĵojn: frambojn, rubusberojn, fragojn, hejmfaritajn likvorojn kaj kukojn el fruktoj. Survoje ni vidis (kaj uzis) la akvon el kuraca fonto. La venontajn tagojn ni ankaŭ iris al la mirindaj ekskursoj: la kanjono Vražji Prolaz, la akvofalo Zeleni Vir, la plaĝo de la bela turisma loketo Šilo... Nokte ni ankaŭ ĝuis — ene aŭ ekstere de la kastelo. Dum la lasta nokto la konata ĉasisto de la regiono danciĝis kaj kantigis nin ludante sian akordionon.

Ŝajnas, ke la beleco de la naturo preskaŭ mem ofertis ĉion. Dankon al la estraro de la kastelo kaj al ĉiuj partoprenantoj, kiuj ĉiam estis helpemaj kaj amikemaj, ni sukcesis efektiviĝi la planitan programon, kaj finfine MIRO vere okazis en ĝoja kaj agrabla ĉirkaŭaĵo. Espereble, estonte pli da homoj partoprenos la organizadon de MIRO kaj vizitos niajn venontajn mirindaĵojn.

Maja Valentić

SET: venont-jare duobla jubileo

La 59a somera lingva tendaro, organizata de esperantistoj el Třebíč, ĉi-jare surprize havis plej multajn infanojn, nome 35, en la tria etapo, dum en la unua etapo 19 kaj en la dua etapo eĉ nur 17, tamen la organizantoj dediĉis sin al ili fervore.

Plej multaj infanoj lernis la anglan lingvon, tri geknaboj la germanan en la unua etapo, Esperanton nur tri knaboj sume, tamen ĉiuj ricevis informojn pri Esperanto kaj ĝia movado. La unuan etapon gvidis junaj gesoldatoj, kvankam civile vestitaj, kiuj alportis novajn ludojn dum la posttagmeza programo.

La unua etapo ludis retpilkon kun la najbara tendaro el la urbo Svitavy (tie troviĝas Esperanto-muzeo). La tria etapo kunlaboris kun alia najbara tendaro, Arbaroj Znojmo, en ilia salono okazis komuna dancamuzo laŭ diskoteka popmuziko, en sportejo futbalo. Do ankaŭ la infanoj de la du najbaraj tendaroj scias pri Esperanto. La plua vetero devigis instrui en kabanoj kaj la manĝejo, kie okazis ankaŭ ludoj. En neniu etapo mankis karnavalo kun maskoj, sekreta elektado de beluloj kaj simpatiuoj, veturado sur la lago en pasaĝerŝipo, vizito de kastelo Vranov.

Fine de la tria etapo kunveturis eksaj tendaranoj, kiuj lernis en la Somera Esperanto-Tendaro antaŭ kelkdek jaroj kiel gejunuloj kaj nun nostalgie revenas ĉiujare. La ĉi-jara renkonto estis jam la 14a. Venontjare do estos du jubileoj — 60a tendaro kaj 15a renkonto de eks-tendaranoj.

**Miroslav Malovec
Věra Podhradská**



IJS: Faktoj kaj impresoj

Inter la 16a kaj 22a de aŭgusto en la urbo Búbánat-völgy (Hungario) okazis la tradicia Internacia Junulara Semajno (IJS) kun 70 partoprenantoj el pli ol 15 landoj, eĉ el ekster-eŭropaj.

La programeroj estis sufiĉe divers-tipaj: okazis tuttaga ekskurso kun ŝipveturo al la proksima urbo Esztergom, “hungara tago” (okaze de la nacia festo) kun komuna kuirado de gulaŝsupo, amuzo “sporta” tago kiu ofte ridigis nin, akvobatalo kaj libera plaĝumado, kaj certe menciindas ankaŭ la kazino kaj la aŭkcio, kiel novaj kaj nekutimaj programeroj...

Kaj kompreneble ne povis manki la internacia vespero — dum kiu nia nacia diverseco interese montriĝis kaj pliriĉiĝis la ĉeestantojn.

Permesu al mi ŝanĝi al maloficiala voĉo kaj personaj impresoj, anstataŭ la faktoj. IJS por ni ĉiuj estis okazo revidi amikojn kaj interkonatiĝi kun aliaj esperantistoj. Certe, dank’ al ĝi naskiĝis novaj amikecoj, kaj ni ĉiuj rehejmiĝis kun multaj belaj memoroj — kaj kun postrenkontiĝa sindromo.

Ĉi tiu IJS estis unika, kiel ĉiu alia Esperanto-aranĝo, kaj ĝi alportis al ni ĉiuj ion malsaman, do ne povas ekzisti iu ĝenerala resumo (krom la faktoj). Por mi estis bonege loĝi tiom proksime al la naturo kaj arbaro (miri pri papilioj kaj la stela ĉielo) kaj esti en tre akceptema kaj bonetosa komunumo, kiun ni kreis por tiuj tagoj. Mian aserton subtenas, ke IJS en mia okazo eĉ signifis grandan kvanton de dormomanko kaj gufujumado — ofte eĉ ĝis la tria aŭ kvara horo matene, babilante kaj pri seriozaj kaj pri senencaj sed tre ridigaj aferoj. Aldone, mi certe ne forgesos pri la filmejo, kiu estis plurfoje plenŝtopita, homoj sidis surlite kaj eĉ surplanke, kaj tio donis iun specialan etoson al la afero, ne la senton, ke estas malkomforta la “haringa vivo”.

Mi tre esperas, ke ĉiuj havis simile belajn tagojn kiel mi, kaj ke multaj partoprenintoj revidos unu la aliajn en Hungario, dum la sekvonta IJS.

Sarolta Bagó

Sur la maldekstra foto estas kelkaj tendaranoj de SET en ekskurso. (Fotis Petra Tóth Sikorová)

Claude Gacond — 80-jara!

Honore al la 80-jara naskiĝdatreveno de la meritplena svisa Esperanto-pedagogo Claude Gacond 27 aŭg 2011 Svisa Esperanto-Societo organizis festotagon en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds, kie la centro de dokumentado kaj riĉega Esperanto-librokolekto (CDELI) lokiĝas kaj kie Gacond aktivas dum 50 jaroj kiel unu el la fondintoj.

La pli ol centpersona festantaro venis el dek landoj. Claude Gacond estis salutata de la prezidanto de la urba ekzekutiva konsilio Pierre-André Monnard kaj de la direktoro de la biblioteko Jacques-André Humair, kiu elstarigis la plurjardekan sindediĉan laboron de Claude Gacond por CDELI.

Probal Dasgupta, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio reprezentis ne nur UEA, sed ankaŭ sian landon, Baraton, kiu tra la personecoj de Gandhi kaj Edmond Privat forte ligiĝis al la agado de Gacond.

Reinhard Haupenthal, redaktinto, faris laŭdacion al Claude Gacond kaj Imri Haupenthal, la eldonistino, transdonis publike la unuan ekzempleron de la fest-libro *Instrui – Dokumenti – Organizati*, kompilitan honore al la jubileulo el artikoloj de dudeko da fakuloj.


El la disĉiploj de Claude Gacond, staĝintaj en la 1970-80aj jaroj en Kultura Centro Esperantista (KCE), tiam gvidata de Gacond, Katalin Kováts, Ilona Koutny kaj Tomasz Chmielik kortuŝe parolis pri siaj memoraĵoj, la signifo de la staĝoj kaj la ebloj, kiuj siatempe estis donitaj al esperantistoj el socialismaj landoj kaj kiuj malfermis por ili vojojn al mondskalaj agadoj.

Katalin Kováts transdonis al la jubileulo valoran donacon: dudekon da originalaj leteroj kaj dokumentoj, korespondadojn inter Andreo Cseh, Julia Isbrücker kaj Edmond Privat. La serio de paroladoj estis kunligita de muzikpecoj danke al la Svisa Esperanto-Koruso kaj al aliaj muzikistoj.

Claude Gacond estis intervjuita de loka radio. 29 aŭg en *L'Impartial* aperis pozitiva artikolo kun foto.

La oficialan festotagon sekvis semajnfina programo organizita de Claude Gacond en La Sagne, proksima vilaĝo, kie li agadis kiel instruisto. Kadre de la amika kunveno Georgo Handzlik el Pollando prezentis sian monodramon pri Zamenhof, malnovaj amikoj kaj kolegoj renkontiĝis, okazis agrabla promenado en Ĵuraso.

Mireille Grosjean, Katalin Kováts



710 Esperanto-kursanoj en Baotou

Ankaŭ en la nova lernojaro 2011-2012 Esperanto restas studobjekto en la programo de la supera mezlernejo Tian Jiabing en la urbo Baotou, Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio de Ĉinio.

La unuajaruloj de la lernejo havas unu Esperanto-lecionon ĉiusemajne, kaj entute ĉirkaŭ 710 lerneĵanoj lernas Esperanton en 12 kursoj. Nun oni planas starigi Esperanto-societon en la lernejo, kio estas malofte en ĉinaj mezlernejoj.

Intereso pri Esperanto en la supera mezlernejo aperis en 2005 post vizito de turisma Esperanto-grupo el Pollando. Poste lokaj samideanoj multfoje propagandis Esperanton al la estroj. Fine en 2008 la lernejo aranĝis libervolan Esperanto-kurson por lernantoj, kiun gvidis Chen Deen. En 2009 Liu Baoguo estis invitita por gvidi pli da libervolaj kursoj.

Ĉar la kursoj estis sukcesaj, la direktoro enlistigis Esperanton en la regulan lernoprogramon por unuajaruloj en la lernejo. Poste la nova direktoro daŭre akceptis Esperanto-kurson.

La lernejon vizitis esperantistoj el aliaj partoj de Ĉinio kaj ankaŭ el Japanio, Mongolio, Hispanio kaj Svislando. La direktoro miris, ke ni diskonigis la lernejon al aliaj landoj per Esperanto, kion ne faris la instruistoj de la angla en la lernejo. Nun la lernejo volonte kontaktas fremdlandajn lernejojn kun Esperanto-kurso por interŝanĝi opiniojn kaj spertojn pri Esperanto-instruado. La lernejo ankaŭ bonvenigas esperantistojn enlandajn kaj eksterlandajn.

✉ verdakoro@yahoo.com.cn

(Laŭ *El Popola Ĉinio*)

Unufraze

★ 7 sep la leĝfaranta konsilio de La Chaux-de-Fonds (Svislando), malgraŭ kontraŭstaro de la urba ekzekutiva konsilio, voĉdonis por akcepto de rezolucio pri Eo per 16 voĉoj kontraŭ 12. (Mireille Grosjean)

★ 25 aŭg post rekonstruado, la urbo-administracio de Campos dos Goytacazes, en la nordo de la brazila ŝtato Rio-de-Ĵanejro, reinaŭguris la Placon de Esperanto. (Fabiano Henrique)

★ E-societo de la Scienca k Teknika Universitato de Interna Mongolio (Ĉinio) varbis inter novaj universitatoj 110 aliĝintojn por E-kurso, kiun instruas Liu Baoguo. (ĈiC)

★ 1–11 sep en la 15a Dujara Internacia Libro-foiro de Rio-de-Ĵanejro, la plej grava librofoiro en Brazilo, estis videblaj k aĉeteblaj E-libroj: spiritismaj k didaktikaj. (Fabiano Henrique)

★ Danke al la Mendoza E-Rondo, libro en/pri Eo estis montritaj en la stando de “Centro internacional del libro” en Librofoiro 2011, okazinta 2–11 sep en la Argentina urbo Mendoza. (Roberto Sartor)

★ Ghil’ad Zuckermann, profesoro pri lingvistiko k endanĝerigitaj lingvoj el la Adelajda universitato, 11 sep malfermis la ekspozicion *Esperanto: Promoting everyone’s language* (Esperanto: disvastigi la lingvon de ĉiuj), kiu funkcios en la migrad-muzeo de Adelajdo (Aŭstralio) ĝis 24 nov. (Kanguruo)

★ Post la sukcesa mallonga filmo *Conlang: the movie* (Planlingvo: la filmo) la usona reĝisoro Marta Masferrer planas novan mallongan filmon, pri eksterteraj fenomenoj, kiu havos tekstojn en Eo. (*Libera Folio*)

★ Baldaŭ estos lokaj balotoj en la regiono de Berlino, k la Pirata Partio (Piratenpartei) aperigis en la reto sian politikan strategion k programon en pluraj lingvoj, ankaŭ en Eo. (*Eŭropa Bulteno*)

★ Ĉi-jara adresaro de *Pasporta Servo* de TEJO enhavas 1087 gastigantojn en 672 urboj en 90 landoj, plej multe el Francio kun 169 gastigantoj en 91 urboj, sed pakistana urbo Multan estas la urbo kun plej multe da adresoj — 21. (GK UEA)

★ 15 aŭg la nova volontulo de TEJO, Sébastien Denux, eklaboris en la Centra Oficejo en Roterdamo post la deĵorofino de la antaŭa volontulino, Manuela Ronco. (TEJO)



Kio estas la reala trezoro de REU?

Oktobre 2011 finiĝas la mandatperiodo de la nuna estraro de Rusia Esperantista Unio (REU), kaj per ĉi tiu artikolo, kiu nepre ne estas laŭvorta raporto pri la farita agado, mi prezentas kelkajn ideojn pri la Unio kaj pri la Esperanto-movado ĝenerale, kiuj aperis dum ĉi tiu tempo. Io estis koncize dirita en mia intervjuo en *La Ondo de Esperanto* (julio 2011), sed nun mi volas pli detale prikomenti la situacion. Ĉar ĉio sube menciita estas nur mia opinio, mi ne aldonu post ĉiu tezo vortojn “laŭ mi”, ĉar tio estas memevidenta.

Nia lando estas integra parto de la mondo, kaj ni alfrontas la samajn problemojn, kiel la planedo entute. Inter tiuj problemoj estas malaltiĝo de la valoro de Esperanto kiel internacia komunikilo. La angla dominas jam delonge, sed la fulma evoluo de teknologioj nun permesas ĝin reale uzi ĉiutage, ne elirante el la hejmo kaj foje eĉ simple tenante poŝtelefonon enmane — afero, kiu praktike ne estis imagebla proksimume antaŭ la jaro 2000. Pere de interreto oni povas rapide interkomunikigi en baza (foje eĉ primitiva) angla, kaj esti tute kontenta pri la rezulto: oni povas nun ekscii ĉiun necesan informon kaj konversacii kun ajna homo sen apliko de Esperanto.

Sendube, homo kiu estas jama esperantisto, preferus demandi alian esperantiston pri io ne ligita kun la movado, sed konvinki neesperantistojn pri tio estas malfacile (kaj foje eĉ tute neeble — ekzemple, oni neniel povas rezervi hotelĉambron aŭ trajnbileton, uzante Esperanton, sed uzante la anglan jes povas, kaj foje uzante *nur* la anglan). Ankaŭ akirado de amikoj funkcias bonege preter Esperanto — pere de sociaj retoj (Facebook k.a.). Senpaga vojaĝado pere de Pasporta servo — unu el tradiciaj Esperanto-alloĝaĵoj — ne (plu) estas unika, ĉar jam delonge ekzistas similaj neesperantlingvaj servoj kiel Couchsurfing, Hospitality Club ktp. Do kiel baza kaptilo ĉefe restas lingvistika interesiĝo kaj absolute ĥimera, nepalpebla kaj malfidinda “Esperanta etoso”. Tio estas universala problemo. Sed krome gravas ankaŭ tio, ke por rusianoj estas sufiĉe malfacile ellerni fremdan lingvon, kaj preskaŭ ĉiuj prave direktas siajn fortojn por lernado de la angla, franca ktp, kiuj estos nepre utilaj por ili, malkiel Esperanto. Oni memoru, ke averaĝa

homo ne posedas elstarajn lingvajn kapablojn, kaj konsiderante fortojn kiuj estas elspezendaj por tia studado, por Esperanto restas malmulta *motivado*. Mi ne diras, ke ellerni Esperanton fariĝis malpli facile ol pli frue, sed nun jes estas malpli facile trovi motivon kaj konvinki homojn por tio.

Pro grava maldensiĝo de alfluo de novaj homoj, kaj konsiderante, ke malnovaj Esperanto-aktivuloj fojfoje malaperas — ĉu pro forpaso, ĉu pro definitiva estingiĝo de la deziro okupiĝi pri Esperanto, ĉu pro aliaj aferoj — aperas problemoj kiu jam senpere tuŝas REU: la kvanto de novaj aktivuloj, kiuj pretas aktivi en REU estas preskaŭ nula. Notu, ke ne temas pri novaj esperantistoj entute.

En nia lando ja estas homoj kiuj efektive estas aktivaj kaj faras multajn utilajn aferojn por Esperanto-movado. Bedaŭrinde, ili estas malmultaj, sed ili jes ekzistas. La problemoj estas, ke ili okupiĝas pri siaj aferoj, kiujn ili elpensis, “naskis”, kaj nun vartas kaj prizorgas. Tio estas privataj iniciatoj. Oni komprenas, pri kio temas — pri kluboj (ekzemple, MASI, gvidata de Irina Gonĉarova), pri eldonejoj (*Sezonoj*, *Impeto*), pri redaktoroj (*La Ondo*, REGo, iom pli frue — *Komencanto*), pri vortaristoj (fakte *la* vortaristo, ĉar nun ĉefe temas pri Boris Kondratjev), pri retaj aktivistoj, kiuj gvidas plurajn retejojn (Andrej Grigorjevskij, Vjaĉeslav Ivanov), pri organizantoj de renkontiĝoj — regionaj, tutlandaj kaj internaciaj — kaj kelkaj aliaj.

Krome oni konsciu, ke la angla vorto “brand” (ni traduku ĝin “vendomarko”) estas ne simpla vorto. *Sezonoj* estas vendomarko. *Impeto* estas vendomarko. REGo estas vendomarko. La granda rusa-Esperanta vortaro, kvankam ĝi ankoraŭ ne aperis, jam estas vendomarko, eĉ se nun malpli kosta, ol aliaj (oni kredu, ke post apero la situacio ŝanĝiĝos). Ankaŭ REU estas vendomarko, sed bedaŭrinde ne tre altvalora. Sekve neniu racia persono pretas transdoni sian vendomarkon al REU. Sed vendomarko ja estas *vendomarko*, do teorie ĝi estas vendoblaĉetebla, sed REU ne estas aĉetopova. Tamen posedantoj ne farus tion ne nur finanzezone. Ja unuavice ili (posedantoj) volas, ke ilia afero ekzistu plu almenaŭ sur la sama nivelo kiel antaŭe, kion neniu anticipe povas

garantii. Samtempe preskaŭ neniu el posedantoj de siaj Esperanto-entreprenoj havas sufiĉe da tempo por ion fari por REU. Estas kelkaj, sed nemultaj, kaj ilia agado, kvankam ĉiuokaze aprezinda, ne kovras ĉiujn problemojn.

Sed tio estas nur unu flanko de la problemo. La alia estas pli grava kaj pli ampleksa, kvankam nomebla koncize: *neniu bezonas ion ajn*. Homoj en Rusio pretas pagi siajn kotizojn, kaj ja pagas, homoj subtenas nin per vortoj, sed reale ili nenion bezonas. La afero estas provebla per du facilaj ekzemploj.

REU lanĉis la retejon “e-klubo.ru” — surbaze de la vikia teknologio. La ideo estis unuigi en unu retejon informojn pri ĉiuj kluboj de Rusio. Dank’ al vikia motoro informo estas korektebla facile kaj do teorie povas esti aktualigata eĉ ĉiusemajne, se necesas. Post ĉiuj preparlaboroj (aĉeto de retnomo, teknika agordo, mana kreado de paĝoj por ĉiuj urboj), kiam venis tempo por plenigi la paĝojn per informoj — afero simpla, postulanta ne pli ol duonhoron, aŭ eĉ malpli — estiĝis silento. Evidentiĝis, ke homoj tion ne bezonas, kvankam mi daŭre opinias la ideon tre bona, speciale kiam temas pri tiom granda lando kiel Rusio. Mi povus, sendube, atingi la rezulton per senĉesa bombardado per leteroj kaj memorigoj, sed por tio mankas tempo. Neformala nomumo de persono, kiu ŝajne pretis respondeci, ankaŭ estis senutila. Povas esti, iam en estonto mi mem faros tion...

Alia ekzemplo estas la nova retejo de REU (reu.ru). Ĝin faris Andrej Grigorjevskij, elspezinte por tio kolosan tempon. Krom la ekstera aspekto (kiu, konsciante, ne estas supermoderna, sed almenaŭ pli aktuala, ol estis pli frue), ĝi enhavas ankaŭ multegajn internajn funkciojn, kiuj estas atingeblaj por simplaj uzantoj (ne nur por la administrantoj). La statistiko montras, ke la retejo estas sufiĉe malvaste uzata. Ne pro komplikeco — ĝi estas facilega, kaj ĉiam oni pretas helpi pri ĝi. Sed pro tio, ke homoj ne multe bezonas ĝin.

Antaŭ la elekto ni multe pensis pri libroservo, pri ĝia reformo kaj modernigo. Estis atingita interkonsento kun privata persono, kiu pretis pagi grandan monsumon el propra poŝo por krei retan librovendejon de REU. Poste mi rezignis la ideon, ĉar jam ekzistas tia vendejo en alia loko kaj duobligi aferojn estus stulte. Sed mi rezignis ne nur pro tio. Evidentiĝis, ke tio estus vana perdo de mono kaj tempo, ĉar laŭ ĉiuj prognozaj vendejoj estus tre malofte uzata — ĉiuj libroj estas aĉeteblaj senpere ĉe eldonejoj aŭ ekzistantaj perantoj, kaj REU ne havas proprajn librojn por vendi (fakte havas, sed ne tiom multajn por krei retan vendejon tiucele).

Sed tio ne estas sufiĉa kaŭzo por ne plu aktivi en la reto — eĉ male. Se ni ne volas ĝenerale postresti, ni ne nur devas sekvi aktualajn tendencojn, ni devas ankaŭ “montri ekzemplon” de moderneco. Ni devas “enretigi” laŭeble multajn kutimajn servojn. La unuaj paŝoj estas sukcese faritaj — ni transiris al nur-retpoŝta dissendado de *Bulteno de REU*. Ni klopodas (kvankam ne ege sukcese pro tempomanko) aktivi en sociaj retoj. Ni esperas baldaŭ enretigi la tutan arkivon de la gazeto REGo. Krome mi planas proponi al la membraro oficialigi distancan partoprenon en REU-konferencoj kaj akcepti plej gravajn decidojn (temas pri ŝanĝoj en la Ĝenerala regularo, probable eĉ elekto de estraro) rete — do anstataŭ

poŝta voĉdonado transiri al retpoŝta. Kvankam mi tute ne celas, ke konferencoj estas ne plu bezonataj. Diskutado kaj “vivaj” konversacioj estas same bezonataj, kiel pli frue kaj neniu reta interkommentado tion anstataŭos. Sed ni devas konscii ŝanĝojn en la mondo — se plejparto de la membroj ĉiuokaze ne povas veni al ĉeesta konferenco, sed povas alimaniere partopreni laboron de la Unio, kial ni malpermesu tion al ili?

Unuigante la du bazajn supre menciitajn problemojn oni povas konkludi: se homoj nenion bezonas, sendube ili ankaŭ ne pretas aktivi. Trovi homojn por multaj taskoj, kiuj ja abundas, estas malpli facile. Oni ne povas simple nomumi kaj devigi homojn ion fari — nun estas alia tempo. Same ne funkciis en REU teorie bonega sistemo, proponita antaŭ kelkaj jaroj — konsilio de spertaj esperantistoj kun “teknika” estraro (kvankam oni notu, ke el la lingva vidpunkto konsilio ne povas esti super estraro, ĉar estraro ja estras, do ĝi devus nomiĝi alimaniere, sed tio ne gravas). La sistemo vere estas bonega, sed ĝi montriĝis ne funkcikapabla en niaj kondiĉoj — kvankam troviĝis plenumantoj (“teknika estraro”), kiu faris sian laboron tute bone, la konsilio mem ne povis funkcii pro multegaj kialoj, inter kiuj estas troamasiĝo de homoj tie, pro personaj miskomunikaj problemoj, sed ankaŭ pro tio, ke homoj reale multon bezonas ekster siaj privataj interesoj.

Kial sufiĉe multaj homoj daŭre pagas kotizojn al REU? Mi pozitive miras, sed ne scias. Verŝajne, pro bona rilato al la movado kaj pro deziro iel subteni ĝin, eĉ se multaj el ili havas sufiĉe nebulan imagon pri ĝi, pri la movado. Sed tio estas avantaĝo kaj en tio mi vidas realan perspektivon. REU ricevas iom da mono — ĉu per kotizoj, ĉu per io alia (vendado de varoj, fojfoja okazigo de renkontiĝoj). Krome REU posedas sian ĉefan trezoron — la membraron. Niaj membroj estas personoj, kiuj ne nur pagas kotizojn, sed ankaŭ havas unikajn spertojn, diversflankajn movadajn sciojn kaj scipovojn, kio estas uzinda. Sekve REU povas esti centro de subteno (ne nur financa) de apartaj iniciatoj. Tio estas vere perspektiva vojo por REU, kaj ni strebos tion efektiviĝi laŭ niaj modestaj povoj.

Ĉi tiu artikolo aperas pli-malpli samtempe en *La Ondo de Esperanto* kaj REGo. Mi dankas ties ĉefredaktorojn — sinjorojn Aleksander Korĵenkov kaj Georgij Kokolija — pro la tre amika konsento publikigi ne-ekskluzivan materialon.

Grigorij Arosev
prezidanto de REU





Labora etoso en la oficejo de E@I

E@I — (post)someraj novaĵoj

E@I havas oficejon

Ekde la 1a de julio 2011 la [societo E@I](#) (Edukado@Interreto) havas sian oficejon! En la urbo Partizánske (kie la organizo estas ankaŭ oficiale registrita) ĝi ricevis lokon por sia unua fizika sidejo. Temas pri ĉambro de 60m², rekte en la urbocentro (la oficejo situas en t. n. “Domo de servoj”, tuj malantaŭ la urbodomo).

Danke al la kunlaboro kaj helpo de la urbodomo (ĉefe la urbestro Jozef Božík) povas nun E@I pli efike labori en sia oficejo pri novaj projektoj kaj aktivajoj. La ejo estas al E@I disponigita kontraŭ simbola unu eŭro jare.

Dum la lasta juna semajno okazis ekipado de la oficejo — necesis plene farbi/kolorigi la ĉambron, kaj plenigi ĝin per la bezonata meblaro — labortabloj, seĝoj, ŝrankoj ktp. Nun la oficejo enhavas laborlokojn por 5 personoj (kiuj efektive dum la somero ankaŭ okupis la oficejon).

Ĉe la urbestro de Partizánske

Post la Somera Esperanto-Studado, aŭguste okazis oficiala akcepto de E@I-teamo ĉe la urbestro de Partizánske, Jozef Božík. Peter Baláž, Jevgenij Gaus kaj Erin Piatieski dankis al li pro la malavara disponigo de la oficejo, kaj la urbestro persone konfirmis sian apogon al Esperanto kaj al la agado de E@I. Li esprimis sian deziron en proksima estonto ankoraŭ pli intense kunlabori kaj videbligi Esperanton en la urbo, kaj la urbon inter la esperantistoj.

Akcepto ĉe la urbestro de Partizánske: (de maldekstre) Peter Baláž, Erin Piatieski, Jevgenij Gaus kaj la urbestro Jozef Božík.



Samtempe tri staĝantoj en E@I dum somero

Unika kaj tre bonvena iniciato estis realigo de tri individuaj staĝoj de studentoj el malsamaj eŭropuniaj landoj per la programo Erasmus, laŭ la antaŭa ekzemplo de Marek Blahuš. Ĉi-somere tiel en Partizánske ĉe la E@I-oficejo staĝis Juan Diego Díaz Bautista el Hispanio, Matthieu Desplantes el Francio kaj Miroslav Hruška el Ĉeĥio.

La staĝantoj laboris jam en la nova oficejo de E@I, krome reprezentis la organizon dum kelkaj Esperanto-aranĝoj kaj aldone helpis organize dum SES.

En la estonto E@I volas plu proponi tian eblon kaj jam nun serĉas novajn staĝantojn. Simile ekde vintro ĝi planas registriĝon ĉe la Eŭropa Volontula Servo (EVS), por tiel povi akcepti ankaŭ pli longtempajn volontulojn kaj ne nur el eŭropuniaj universitatoj.

Slovake.eu kun pli ol mil uzantoj

La unua retejo de E@I por instrui nacian lingvon estas [www.slovake.eu](#). La projekto *Slovak Online*, subtenita de la Eŭropa Unio (pere de la agentejo EACEA), naskiĝis surbaze de spertoj atingitaj dum la kreado de lernu.net. La nova multlingva paĝaro, per kiu eblas lerni la slovakon kaj konatiĝi kun Slovakio kaj ĝiaj historio, kulturo kaj vidindaĵoj uzeblas ankaŭ en Esperanto.

La retejo funkcias nur ekde majo, sed jam registriĝis ĉe ĝi pli ol 1000 personoj. Nuntempe ĝi funkcias en sep lingvoj, sed planataj estas ankoraŭ pliaj — aldoniĝi devus, ekzemple, la rusa aŭ la hungara.

Ankaŭ pere de tiaj ĉi iniciatoj kaj projektoj esperantistoj povas montri (kaj pruvi), ke ili vere subtenas lingvan divers-econ kaj pretas defendi kaj protekti ankaŭ malgrandajn, minoritatajn lingvojn.

Projekto por instrui la komercan hispanan

Se vin interesas komercaj kontaktoj kaj la hispana lingvo, bv. viziti la novan paĝaron [www.espa2.eu](#). Ĝi estas produkto de projekto ESPA 2.0 kadre de Programo de Tutviva Lernado de EU “Leonardo da Vinci”, en kiu E@I zorgis pri tradukoj al la slovakaj kaj ĉeĥaj lingvoj.

Temas pri platformo kun konsiloj kaj iloj por konstruado de komercaj kontaktoj inter la Centra kaj Orienta Eŭropo kaj Hispanio, kiu ebligas ankaŭ studadon de la moderna komerca hispana lingvo.

La celpubliko estas malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj el la Centra kaj Orienta Eŭropo, kiuj interesiĝas pri kunlaboro kun firmaoj en Hispanio. La retejo ĝis nun ekzistas en 11 lingvoj (Esperanto ankoraŭ mankas).

E@I instruos la germanan!

Post *Slovak Online*, la unua granda projekto kiun E@I realigis per EU-mono, venis ĉi-somere, ĝuste dum SES, informo de la agentejo EACEA pri aprobo de plia projekto — ĉi-foje E@I konstruos retejon por instrui la germanan lingvon: *Deutsch Online*.

La projekto estos eĉ pli ampleksa (kaj kosta) ol tiu pri la slovakaj lingvoj: Partoprenos ĝin ok partneroj el ses landoj. La tuta buĝeto estas 485 mil 857 eŭroj. El tiu sumo 75%, t. e. 364 mil 391 eŭroj, venos el Bruselo. La projekto komenciĝos en novembro 2011 kaj la kreado de la tuta platformo daŭros du jarojn, ĝis novembro 2013.

E@I planas monpeti ankaŭ venontjare por lingvo-lernigaj retejoj, ankaŭ por aliaj lingvoj.

Peter Baláž

Ĉu malhisi la flagojn?

de Dafydd ab Iago

Membro-ŝtatoj de la Eŭropa Unio kun troaj ŝuldoj devos malhisi siajn flagojn ĝis duono de la flagmasto. Tio estas unu el la plej amuzaj ideoj, proponitaj de la germana membro de la Eŭropa Komisiono Günther Oettinger. Efektive, Oettinger respondecas pri energio kaj ne estas konata kiel spertulo en ekonomiaj kaj financaj aferoj. Oettinger ankaŭ proponas, ke impostoficistoj el aliaj EU-landoj helpu la grekan ŝtaton kolekti impostojn, ĉar la grekoj *evidente* ne kapablas ĝis nun fari tion.

La vortoj de la germana komisionano kaŭzas protestan ŝtormon en la malfeliĉaj landoj kaj aldonas nenion konkretan al la debato pri superado de la ekonomia kaj financa krizo en Eŭropo. Eĉ la prezidanto de la Eŭropa Komisiono, José Manuel Barroso, ŝajnis kritiki tiajn stultajn proponojn. “En la kakofonio de kritikoj, rebatkritikoj, magiaj kugloj kaj miraklaj universalaj kuraciloj, kiuj ĉiutage estas proponataj, la vero tute ne aŭdeblas. Solidaj, fareblaj kaj betonaj proponoj jam estas faritaj kaj interkonsentitaj”, — Barroso diris en la Eŭropa Parlamento.

Tamen la prezidanto de la Komisiono agnoskas, ke Eŭropo tro malfrue reagis kaj interkonsentis la solvojn. Kaj eĉ nun, kun Grekio kaj aliaj landoj, starantaj sojle de bankroto, Eŭropo ne rapide enkondukas kaj efektivigas la interkonsentitajn proponojn.

La Pollanda financministro Jan Vincent Rostowski, ankaŭ en la Eŭropa Parlamento, pentris preskaŭ senesperan bildon de la Eŭropa situacio: “Sendube ni estas en danĝero kaj Eŭropo estas en danĝero. Se la eŭrozono disfalos, la Eŭropa Unio ne vivos multe pli longe”. Rostowski plie citis lastatempan studon de la svisa banko UBS, laŭ kiu eliro el la eŭrozono kostus al la pli malfortaj EU-landoj ĉirkaŭ 40-50% de iliaj



Prezidanto de la Eŭropa Komisiono, José Manuel Barroso, alvokas ĉiujn al pli da laboro. (Foto de la Eŭropa Komisiono)

respektivaj malnetaj enlandaj produktoj en la unua jaro. En postaj jaroj, la landoj kiel Grekio, Portugalio, Hispanio kaj Italio, povus perdi plie 10-20%.

Laŭ la svisa raporto eĉ riĉaj landoj, inkluzive de Germanio, dum la unua jaro perdus 10-25% de siaj respektivaj malnetaj enlandaj produktoj. Poste ili alfrontus pli malaltan ekonomian kreskon kaj pli altan senlaborecon.

“Ni estas puŝantaj Grekion en truon, el kiu ĝi ne elmergiĝos sen malpezigi sian monon. Greka bankroto estas nur demando de tempo”, — diris Derk Jan Eppink por la eŭroskeptikaj konservativuloj.

En la Eŭropa Parlamento, Barroso provis trovi pozitivan noton. “La signalo, kiun mi ricevas plurfoje kaj denove de niaj tutmondaj partneroj, inkluzive de la grupo G20, estas tio, ke la mondo atendas pli integran Eŭropon. En la epoko de la tutmondigo, ĉiuj atendas, ke Eŭropo estu pli forta kaj unueca”, — diris Barroso. Tiuj vortoj estas ege malfacilaj por plenumo en la nuna tempo.

Du malsamaj pensioj

Mi emas komenti iun aspekton de la interesplena artikolo de Dafydd ab Iago *Eŭropo falanta*, aperinta en la numero 202 de *La Ondo de Esperanto*. Temas pri la problemoj de li menciitaj rilate al la pensioj en Hispanio.

Pensio estas repago al la maljunaj ge-laboristoj ekvivalenta al la sumoj devige ŝparitaj tiucele dum ilia labora vivo. Tiuj devigaj ŝparoj, almenaŭ en Hispanio, estas deduktataj fare de la dungistoj el la salajroj, kaj pagataj al ŝtata organo, la t. n. “Socia Asekuro”, kiu investas kaj prizorgas finance la kolektitan monon por garantii la repagon al la emeritiĝintoj. Tiu sistemo, ĝis nun, funkcias senprobleme en Hispanio. Mi mem estas pensiulo, kaj ricevas akurate la pagon ĉiumonate.

La problemoj aperis rilate al specialaj pensioj kiujn oni pagas al maljunaj viroj kaj virinoj kiuj ne faris la devigan ŝparon, interalie, ĉar ili neniam ricevis salajron aŭ ricevis ĝin dum mallonga tempo kaj ne havas rajton ricevi la normalan pension. Tiuj pensioj (hispane: “Pensiones no contributivas”) estas pagataj ne de la centra hispana ŝtato, sed de la ŝtateroj, la t. n. “Aŭtonomaj Komunumoj”.

Pro la krizo, efektive ekzistas problemoj por la pago de tiaj specialaj pensioj en kelkaj hispanaj komunumoj. Sed la normalaj pensioj estas pagataj akurate fare de la centra ŝtato.

Dario Rodriguez (Madrido, Hispanio)

Al nova jaro kun EsperantoLand

La 10a Novjara Renkontiĝo (NR) de EsperantoLand okazos en Bitburg, 30 km norde de Trier, en Germanio ĉe la okcidenta landlimo. Kunvenos denove ĉ. 150 ĝis 200 homoj el deko da landoj, kiuj komune pasigos belan semajnon, de 27 dec 2011 ĝis 3 jan 2012 — kun prelegoj kaj diskutoj, koncertoj kaj (pup)teatro, infana kaj junula programo, kun iom da esplorado de la ĉirkaŭo kaj kun multa amika babilado.


Por junuloj estos aparta programo, la 3a Novjara Internacia Semajno (NIS). Ni plu kredas, ke estas bona ideo oferti Silvestran semajnon por tiu celgrupo ĉe la okcidenta rando de Germanio, proksime al Belgio, Francio, Luksemburgio kaj Nederlando. Eble povos logi vin, ke la domo havas apartan kinosalonon, kie realiĝos bela filmprogramo dumsemajna.

Pliaj informoj: <http://www.esperantoland.org/nr>

27 aŭg 2011 en Amsterdamo forpasis

Nelly Holveitch (1946–2011)

naskita en Bulgario, kie ŝi lernis Esperanton en 1980, ŝi migris al Nederlando kaj aktivis en la entrepreno de la edzo, elektronika inĝeniero. Ŝi kunlaboris kun Hans Bakker en lia agado por Afriko, kunfondis Feminisman Esperanto-Movadon (2004), estis membro de la Senato de la Esperanta Civito, en kiu ŝi gvidis la opozician Blankan Liston.



Plurformismo en Esperanto

La tria eseo de Ryszard Rokicki

0. ĈAGRENA HEREDAĴO DE ZAMENHOF

Antaŭ ol analizi iun ajn temon ligitan kun la vortfara sistemo de Esperanto, ni devas ordigi nian scion pri la bazaj lingvoelementoj, el kiuj la lingvouzantoj kreas vortojn kaj pli kompleksajn tekstojn. Komence ili troviĝis en la kvarlingva Fundamenta Vortaro, da ili estis apenaŭ mil. Post unu jarcento la vortaro kreskis multoble ĝis la amplekso de la Nova PIV. Kio estas la lingvoelemento, ni intuicie scias, kio estas la vorto — pli-malpli — ankaŭ. Sed kiel tiujn lingvistikajn nociojn perceptis Zamenhof? Jen kelko el lia klarigo el la Unua Libro:

Mi aranĝis plenan dismembrigon de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el senŝanĝaj vortoj <...> En tia maniero la dismembrigo de la lingvo neniam embarasas la lernanton; li eĉ ne suspektas, ke tio, kion li nomas finiĝo aŭ prefikso aŭ sufikso, estas tute memstara vorto, kiu ĉiam konservas egalan signifon, tute egale, ĉu ĝi estos uzata en la fino aŭ en la komenco de alia vorto aŭ memstare, ke ĉiu vorto kun egala rajto povas esti uzata kiel vorto radika aŭ kiel gramatika parteto.

En tiu prefaca klarigo Zamenhof difinis sian lingvistikan teorion, kaj la tasko de Esperanto-lingvisto estas eltiri implicaĵojn el tiu teksto kaj el aliaj troviĝantaj en la Fundamento de Esperanto. Eltiri implicaĵojn ofte signifas suriri la kampon de individua kaj subjektiva interpreto. Tradicia, klasika teorio pri Esperantaj vortoj deklaras, ke vortradikoj rolas sendepende de siaj finaĵoj kaj havas en si mem kategoriecon: substantivecon, verbecon kaj adjektivecon.

1. LINGVISTIKE PRI RADIKOJ KAJ DERIVADO

Komence de ĉi-jarcento usona lingvisto Ken Miner ellaboris t. n. vortbazitan teorion pri derivado kaj deklaras, ke “Radikoj ne rolas en derivado”¹. Laŭ tiu teorio, novaj vortoj deriviĝas ne de radikoj, sed de jam ekzistantaj vortoj.

La demando pri la rolo, kiun plenumas radikoj en deriva sistemo, do **ĉu novajn vortojn oni kreas de radikoj aŭ de aliaj vortoj**, estas grava ne nur teorie. Ĝusta respondo al ĝi povas kontribui, ke, ekzemple, ni pli trafte, se ne solvos, do almenaŭ alfrontos la problemon kiel difini kapvortojn en nova plena vortaro de Esperanto, pri kio lanĉis diskuton Bertilo Wennergren².

2. PLURFORMISMOJ

Por prilumi iom la problemojn de derivado, mi analizu la fenomenon de plurformismo. Ĝia esenco estas, ke ekzistas malsamaj lingvaj esprimformoj, kiuj plenumas la saman signifan funkcion. Interesos min precipe tiuj plurformaj paroj, el inter kiuj almenaŭ unu elemento estas morfologie tuteca vorto. En la plurformaj paroj mi analizos la funkciadon de unuopaj radikoj por konkludi pri ilia rolo en la vortfara sistemo de Esperanto. La entreprenata analizo espereble permesos trovi respondon al la supre starigita demando pri la **rolo de radikoj en la vortfara sistemo de Esperanto**.

La analizatan lingvan materialon, kiu konformas plene al mia lingvouzo, mi ĉerpis el la artikoloj de PIV (same el uzekzemploj kiel klarigoj kaj difinoj pri la signifo de koncernaj formoj) kaj el la Tekstaro.

2.1. Plurformismo sintaksa (prepozicia)

Ni analizu la subajn frazerojn:

- [1] *osta* [malsano] = [malsano] *de osta*
- [2] *ligna* [dometo] = [dometo] *el ligno*
- [3] [labori] *hejme* = [labori] *en [sia] hejmo*
- [4] [iri] *buse* = [iri] *per buso*
- [5] *busa* [ekskurso] = [ekskurso] *per buso*

Ni povas distingi parojn, kies unu elemento enhavas prepozicion dum la alia ne. Ilia komunaĵo estas la grafika formo de radika parto. Pli detale tiun fenomenon montras la tabelo 1 (vd. p. 13).

Analizante la esprimparojn el la tabelo 1, ni konstatas, ke:

— la signifoj de la radikoj restas en ambaŭ parvortoj samaj;

— la samaj estas ankaŭ la signifaj funkcioj de sintezaj kaj analizaj formoj, (*~a* = *de ~o* aŭ *el ~o* kaj *~e* = *en ~o*, aŭ *per ~o*).

Tiuj lingvaj faktoj konkludigas, ke en Esperanto ekzistas klaso de radikoj, kiuj konsistigas *samsignifajn formojn sintezajn* (t. e. unuvortajn) kaj *formojn analizajn* (prepoziciajn). Ĉi-punkte altrudiĝas la demando, kiom produktivaj estas la strukturoj kaj kiajn limigojn ili havas.

La tabelo montras ankaŭ, ke ne estis tute senbazaj siatem-paj sugestoj de esperantologoj, ke en Esperanta deklinacio, ni havas eble pli da kazoj ol nur nominativon kaj akuzativon. Iu, kiu ne konas tradiciajn priskribojn de Esperanto, eble povus

Tabelo 1. Plurformismo sintaksa

	Radikoj	Formoj		Ekzemploj
		sinteza	analiza	
1	OST	~a	de ~o	Pro longa <i>osta</i> malsano li lamas nun. Pro longa malsano <i>de osto</i> li lamas nun.
2	LIGN	~a	el ~o	Ili aĉetis en IKEA <i>lignan</i> tablon por sia kuirejo. Ili aĉetis en IKEA tablon <i>el ligno</i> por sia kuirejo.
3	HEJM	~e	en ~o	Bonŝance, mi povas labori <i>hejme</i> kaj nur unu foje semajne aperi en la oficejo. Bonŝance, mi povas labori <i>en hejmo</i> kaj nur unu foje semajne aperi en la oficejo.
4	BUS	~e	per ~o	La tuta klaso <i>buse</i> ekskursis al Londono. La tuta klaso <i>per buso</i> ekskursis al Londono.
5	BUS	~a	per ~o	Nia <i>busa</i> ekskurso al Londono estis tre interesa. Nia ekskurso <i>per buso</i> al Londono estis tre interesa.

konkludi, ke en tiuj formaĵoj prezentiĝas substantiva deklinacio? Eble ĉi-kaze la PAG-aŭtoroj ne estis tiom for de la ver^o, kiom oni foje bloge atribuas al ili?

2.2. Plurformismo afiksoida (semantika)

Alian tipon de plurformismo prezentas samsignifaj vortparoj, kies morfologio konsistas el malsama nombro de elementoj. Ni analizu frazerojn de jena tipo:

[6] *osteca* [vizaĝo] = [7] *osta* [vizaĝo]

[8] *silkeca* [lano] = [9] *silka* [lano]

[10] *hejmece* [vestita] = [11] *hejme* [vestita]

[12] *akvumi* [plantojn] = [13] *akvi* [plantojn]

La funkciadon de la radikoj kaj afiksoj en la supraj ekzemploj prezentas la tabelo 2.

Tabelo 2. Plurformismo afiksoida (semantika)

	Elementoj semantikaj		Finajoj	Ekzemploj
6	OST	EC	A	<i>osteca vizaĝo</i>
7	OST	—	A	<i>osta vizaĝo</i>
8	SILK	EC	A	<i>silkeca lano</i>
9	SILK	—	A	<i>silka lano</i>
10	HEJM	EC	E	<i>hejmece vestita</i>
11	HEJM	—	E	<i>hejme vestita</i>
12	AKV	UM	I	<i>akvumi plantojn</i>
13	AKV	—	I	<i>akvi plantojn</i>

En tiu ĉi kazo, altrudiĝas la demando, kiel okazas, ke ambaŭ esprimformoj havas la saman signifon malgraŭ tio, ke ili konsistas el malsama kvanto da lingvoelementoj:

RADIKO + EC + A aŭ RADIKO + A,

RADIKO + EC + E aŭ RADIKO + E, aŭ

RADIKO + UM + I aŭ RADIKO + I?

Ĉu la produktivo de tiuj strukturoj estas limigita? Kiel?

La demandoj estas nek banalaj nek harfendaj. Ofte starigataj ĉe lingvokonsciaj esperantistoj kaj instruistoj de Esper-

anto. Foje eĉ okazas, ke iuj dubas konfuze pri la ekzemploj en la tabelo 2, kvankam ili kaj ankaŭ aliaj similaj estas registritaj kaj priskribitaj en PIV aŭ troveblaj en la Tekstaro kaj prezentas per si mem empiriajn faktojn analizendajn lingvistike.

Analizante tiutipajn formaĵparojn, mi pretas hipotezi, ke en la daŭro de evoluo en Esperanto kreiĝis novaj radikoj (esprimantaj la signifojn, jam sen la kutima sufikso EC aŭ UM). Formoj trielementaj, verŝajne pro internaj lingvoekonomiaj kialoj, transformiĝis en duelementajn: *osteca* = *osta* aŭ *akvumi* = *akvi*. Alivorte, la signifajn funkciojn de OST kaj EC transprenis sur sin la nove kreiĝinta radiko OST [bis] — aperanta en la formaĵo *osta* (sed jam ne plu en *osteca*) kaj la signifajn funkciojn de AKV kaj UM transprenis la nove kreiĝinta radiko AKV [bis] — aperanta en la formaĵo *akvi* (sed ne plu en *akvumi*) k. s.

2.3. Plurformismo predikativa (sintaksa EC)

Specifan klason de plurformismo prezentas vortoj kun *~ec~* aperantaj i. a. en la sekvaj esprimparoj:

[14] Dum la *prezidanteco* de I. Lapenna okazis, ke...

[15] Dum I. Lapenna *estis prezidanto* okazis, ke...

[16] En mia *infaneco* mi tre amis la rusan lingvon.

[17] Dum mi *estis infano* mi tre amis la rusan lingvon.

[18] Ŝin frapis la *beleco* de la vespero.

[19] La vespero *estis bela*, tio frapis ŝin.

En formaĵoj kiel ĉi-supre prezentitaj la funkcio de la vortparto *~ec~* egalas al la funkcio de la sintagma strukturo *esti ~o* aŭ *esti ~a* — en tiuj esprimoj aperas la sintaksa sufikso *~EC~*. Dum en aliaj ekzemploj, kiel:

[20] *lia prezidanteca parolmaniero*

[21] *infanecaj ŝercoj*

[22] *akveca supo*

per la vortparto *~ec~* realiĝas la sufikso [EC] = *trajto*.

2.4. Malapero de signifo-diferenco

Rimarkinde estas, ke en kelkaj tipoj de plurformaj paroj foje malaperas signifo-diferenco inter du formaĵoj el la vortkvaro. Tiun fenomenon prezentas la tabelo 3 entenanta ekzemplojn registritajn aŭ priskribitajn en PIV aŭ la Tekstaro.

Tabelo 3. Nuliĝo de signifo-diferenco

	Ekzemploj	Derivaĵoj	Malapero de signifo-opozicio	Formaĵoj sintaksaj	Ekzemploj
23	~ lano	<i>silkeca</i>	<i>silka</i>	<i>el silko</i>	~ bluzo
24	~ odori	<i>hejmece</i>	<i>hejme</i>	<i>en hejmo</i>	~ labori
25	mallegebla ~	<i>skribaĵo</i>	<i>skribo</i>	<i>skribi</i>	~ daŭris longe
26	konduto ~	<i>prezidanteca</i>	<i>prezidanteco</i>	<i>esti prezidanto</i>	dum ~ okazis multe

La fenomeno de plurformeco en Esperanto estas tre ofte prisentata en lernolibroj, kvazaŭ ĝi ne ekzistus en la lingvo-uzo aŭ ne estus konforma al la spirito (t. e. strukturo) de Esperanto. Efektive, tiu fenomeno ne konformas al la idealisma percepto de la lingvo trovebla en la enkonduke citita prefaca klarigo de Zamenhof pri siaj lingvistikaj konceptoj. Ĉi tie valoras citi la vortojn de pola lingvisto, prof. Mirosław Bańko, kiu en la lingvo-konsulteja blogo de Scienca Eldonejo

PWN diskutante pri ia problema lingvonormiga fenomeno skribis: «En lingvoj naturaj — kiel la pola, latina aŭ Esperanto — ĉiuj reguloj efikas nur proksimume (i. a. en tiu fenomeno respeguliĝas la “natureco” de lingvoj naturaj ...»³

3. ANALIZKONCEPTOJ DE VORTFARAJ FENOMENOJ EN ESPERANTO

Analizi la prezentitajn fenomenojn de plurformismo en Esperanto eblas diverse, depende de la celoj atingotaj kaj de lingvoanalizaj skoloj.

Laŭ la **tradicia** vortfara koncepto, vortklasaj finaĵoj estas nur kvar. La intenco de Zamenhof estis, ke ili plenumu sintaksajn funkciojn — informu, ĉu la vorto plenumas funkciojn karakterizajn por substantivo, verbo aŭ adjektivo/adverbo.

Eĉ supraĵa analizo montras, ke la rilatoj inter la radikoj (respektive radikaloj) kaj vortklasaj finaĵoj ne estas facilaj por priskribi. Adeptoj de la gramatika karaktero aplikas tradician manieron alfronti la problemon, nome: **unu formo = unu radikio**. Tiu praktiko forte enradikiĝis en la Esperantan lingvopriskriban tradicion kaj estas nun aplikata de vortaristoj ĝis, inkluzive, la Nova PIV. Oni tendencas atribui al la t. n. finaĵoj aldonajn signifajn funkciojn — aldonajn, ĉar nek en la Zamenhofa gramatiko, nek en lia vortaro io tia estis prezentita. Zamenhof tradukis radikojn, ne vortojn aŭ leksemojn. Sekve eblas, aŭ eĉ nepras konkludi, ke por li t. n. finaĵoj (malgraŭ, ke eĉ de li mem konsideritaj “memstaraj vortoj”) ne estis, en si mem, signifoportaj elementoj. Ĉion ĉi prezentas la tabelo 4.

Tabelo 4. Tradicia vortanalizo

	Vortformoj	Signifoj	Signifaj elementoj	
			Radikoj	Finaĵoj
27	<i>silka</i>	{= silkeca}	<i>silk</i> {= SILK}	<i>~a</i> {= A[+EC]}
29	<i>akvi</i>	{= akvumi}	<i>akv</i> {= AKV}	<i>~i</i> {= I[+UM]}

Por pli senkonfuzo priskribi tiun fenomenon oni devas apliki alternative leksemstrukturan metodon analizi la rilatojn inter la radikoj kaj la vortklasaj finaĵoj, nome: **unu funkcio = unu radikio**. Funkciado de la radikio estas strikte ligita al ties signifo(j), kio evidente respeguliĝas en la strukturo de la leksemo. Tiu alfronto ebligas al ni pli profunden analizi la strukturon de Esperantaj leksemoj. En la leksemstruktura priskribo de la vortfara sistemo, la signifo de la formoj *~ec~* kaj *~um~* estas lokita en la radikojn mem, for de la finaĵoj *~a* kaj *~i*. Tiun priskriban manovron prezentas la tabelo 5.

Tabelo 5. Leksemstruktura vortanalizo

	Vortformoj	Signifoj	Signifaj elementoj	
			Radikoj	Finaĵoj
28	<i>silka</i>	[= silkeca]	<i>silk</i> {= SILK[+EC]}	<i>~a</i> {= A}
30	<i>akvi</i>	[= akvumi]	<i>akv</i> {= AKV[+UM]}	<i>~i</i> {= I}

La ĉefa diferenco inter la tradicia kaj leksemstruktura vortanalizoj estas la loko en la strukturo de la vorto, kie aperas novaj aldonaj signiferoj (*~EC~* kaj *~UM~*).

Priskribante la vortfaran sistemon de Esperanto, oni devas fari tranĉan decidon: ĉu oni ŝarĝu per la aldonaj signifo la finaĵojn (*~A* kaj *~I*), aŭ la radikojn (*SILK~* kaj *AKV~*)?

Miaopinie, aldono de reguloj difinantaj diversajn signifojn de la finaĵoj en la gramatikon ŝargus ĝin tro kaj komplikus senbezone. Celante maksimume klaran kaj simplan priskribon de la vortfara sistemo, mi proponas rezigni pri la tradicia priskribosistemo, kiu implicas, ke finaĵoj plenumas aldone semantikajn funkciojn antaŭviditajn ĉe Zamenhof por afiksoj (EC, AĴ, UM k. s). Proponata de mi, leksemstruktura priskribo de la vortfara sistemo de Esperanto ne atribuos al la finaĵoj pli da funkcioj ol difinas la Fundamento. Ŝarĝo de leksemo per novaj signifoj ne nur priskribas adekvate la lingvouzon, sed estas ankaŭ pli taŭga kaj efika el struktureksplika vidpunkto.

La prezentita supre analizo de elektitaj ekzemploj de plurformismo montras, kiel vivas kaj disvolviĝas la lingvo mem. Ĝi posedas mekanismon, kiu permesas kreiĝojn de novaj radikoj. Tio okazas nature, kiel en etnaj lingvoj, eĉ se la parolantoj ne rimarkas tion: La lingvouzantoj kreas novajn radikojn konforme al la, en la lingvo ekzistantaj (eĉ se latentaj) reguloj. Studante la fenomenon de plurformismo oni povas hipotezi, ke el duelementaj radikaloj, ekzemple, *SILKEC~* aŭ *AKVUM~* k. s. kreiĝas novaj radikoj semantike pli sintezaj: *SILK~* {= *silkec~*} kaj respektive *AKV~* {= *akvum~*} kaj similaj. La mekanismo estas simpla: la jam ekzistanta radikformo ensorbas (eble sub influo de uzofteco) ankoraŭ unu signiferon (reprezentiĝantan per koncerna sufikso) kaj rezultiĝas nova kvalito — radikio ĝemela, samforma, sed ne samfunkcia.

La rezultoj de la supre prezentita analizo de lingvaj faktoj permesas oponi kontraŭ la apliko de la vortbazita teorio pri derivado de K. Miner kaj konkludi, ke: **Esperantaj radikoj grave** — signifodistinge — **rolas en la vortfara proceso** ĉar **oni kreas novajn vortojn de radikoj** kaj ne de vortoj.

La vortbazita teorio povas eble bone funkcii en la kampo de la Croft-modelo kaj kun ĝi en la ĝeneralaj lingvistikaj teorioj, sed ĝi estas malfacile aplikebla por solvi praktikajn problemojn aperantajn ĉe la priskribo de la lingvo sur la bezonnivelo de PAG, PMEG, PIV kaj similaj konsultverkoj de Esperanto.

Mi estas certa, ke pli profunda analizo pri la konduto de la radikoj en la vortfara sistemo permesos disklasigi ilin pli sistemece ol tion faris la aŭtoroj kaj adeptoj de la teorio pri la gramatika karaktero de Esperantaj radikoj kaj helpas solvi ne nur la jam centjaran “bros-problemon”, sed ankaŭ aliajn aperantajn foj-foje ĉe la lingvouzantoj.

4. APLIKA EKZEMPLO

Senfrukta estus la diskuto, se ĝi portus nenian utilon al la praktiko. Mia analizo celas rigardi la vortfaran sistemon de Esperanto el alia perspektivo, eble eĉ rigardi ĝin pli profunden ol tion foje proponas Esperanto-movadaj gramatikoj. Unu el la utiloj estas helpi al la uzantoj ĝuste kaj laŭsence uzi la lingvon kaj defendi sian lingvouzon kontraŭ fojaj konfuzigaj sugestoj enŝteliĝintaj i. a. en tian verkon kiel PMEG, pri kiu la konata usona lingvisto Ken Miner skribis: “la plej zorga, ampleksa, detala kaj komprenebla praktika gramatiko de nia lingvo ĝis nun havebla”⁴.

Jen unu el konfuzaĵoj:

Oni povas trovi en PMEG⁵ jenajn informojn pri E-vortoj:

tage = en (la) tago(j)

matene = en (la) mateno(j)

lunde = en (la) lundo(j), en ĉiu lundo

kun trafa rimarko, ke: “La signifo de E-vorto dependas kaj de

la signifo de la radiko, kaj de la kunteksto”⁶. Supraĵe legante, oni povas prave konkludi, ke ekzistas kunteksto, kie la formaĵoj *matene*, *tage*, *lunde* signifas aŭ: *en ĉiu mateno / tago / lundo* aŭ simple: *en mateno / tago / lundo* (ne gravas, ĉu ĉiu, aŭ ne ĉiu) ktp... Legante pli atente, en alia loko de la manlibro⁷ oni informiĝas, ke «E-vorta formo de tia tagonomo normale montras, ke temas ĝenerale pri tiaj tagoj: *dimanĉe* = “en dimanĉoj, en ĉiu dimanĉo”».

Tiun PMEGan neregulan neŭtriĝon de nombro prezentas la tabelo 6.

Tabelo 6. Neregula neŭtriĝo de nombro

	Singularo	Neŭtriĝo nombra	Pluralo
31	en mateno	matene	en matenoj
32	en tago	tage	en tagoj
33	<i>en ĉiu lundo</i>	<i>lunde/ ĉiulunde</i>	<i>en ĉiuj lundoj</i>
34	*en lundo	lunde	en lundoj

La sugesto, ke *matene* povas signifi *en mateno*, sed *lunde* ne povas (normale) signifi *en lundo* estas stranga. Se iu havas dubojn, tiu kontroli la signifojn de la formaĵoj *dimanĉe*, *lunde* ktp. en la Tekstaro. Certe oni trovos ankaŭ multajn uzojn en la signifo de *en dimanĉo* respektive *en lundo* ktp.

Alian strangaĵon prezentas la PMEGa klariga artikolo pri la akcento en kunmetitaj vortoj⁸, kiu montras, ke la aŭtoro perdiĝis, analizante la empiriajn faktojn, kiujn li renkontadis partoprenante en parola interkomunikado. Siatempe, mi pri-traktis tiun problemon pli detale⁹.

Kial do oni povas trovi tiajn gramatikajn misinterpretojn (se ne nomi ilin eraroj) en la Esperanto-Movada gramatika manlibro? Ĉu nur pro amatoreco?

Miaopinie ne, ĉar ni (uzantoj) ja rajtas esti amatoroj kaj nuraj lingvohobiuloj. Ankaŭ la verkinto rajtas esti tia, sed liaj kunlaborantoj, recenzintoj, opiniintoj? De ili ni rajtas atendi profesiecan respondecon, ne nur cerboŝtopan prilaudon de la verko (eĉ se multeflanke interesa kaj leginda kaj rekomendinda). Nu, ja unu tian mi trovis, sed tiu, legante ĝin, eksentis sin duonidiota¹⁰. Alia (nelingvisto, sed kun lingvista intuicio) spertis neeblecon solvi lingvajn problemojn per ĝi kaj prezentis blage siajn dubojn, sed ne ricevis klaran respondon¹¹ (ankaŭ de lingvistoj!). Informiĝis (sambloge) pri sia “iom mallarĝa kaj malfleksebla kompreno de gramatiko” sed iel ne aŭdacis komuniki al lingvisto, ke tiu laŭ lia opinio malpravas. Tro modeste! Lingvistoj ne estas ĉion-sciaj, ili ja rajtas erari kaj foje uzas iun rajton (des pli, ke nur tre malmultaj kapablas rimarki tion).

Miriga en la hodiaŭa sekulariĝinta Eŭropo estas tiu senkritika kredemo aŭ eĉ pieca fido trovebla preskaŭ ĉiuloke, se legi komentariojn pri la menciita gramatika manlibro. Ĉu tio eble estas nur la fenomeno de la ora bovido, al kiu sopiras popolo? Aŭ eble estas nur kelkaj individuoj, pri kiuj Andy Künzli siatempe komentis “kiuj probable malmulton komprenas pri Eo-gramatiko, kiel kutime”¹²..

Mi ne scias, respondu fakuloj pri la homa aŭ grupa psikoj, mi siatempe magistriĝis nur pri aplika lingvistiko.

Plurformismo en Esperanto estas la tria ero en la tri-artikola ciklo de la Pollanda esperantologo Ryszard Rokicki. En La Ondo jam aperis: Quo vadis, Esperanto-lingvistiko? (2011, №4-5) kaj Mia apliko de lingvistiko al Esperanto (2011, №6). Komentoj estas bonvenaj.

NOTOJ

1. Citita laŭ: Miner, Ken. *Croft-modelo por la Esperanto radiko-kategorieco (1) // Lingva Kritiko.*
2. Wennergren, Bertilo. *Bazformoj de radikoj en vortaroj // Lingva Kritiko.*
3. Citita laŭ: <http://poradnia.pwn.pl/lista.php?id=11442>. Traduko mia.
4. Citita laŭ: <http://www.liberafolio.org/2010/>
5. <http://bertilow.com/pmeg/gramatiko/e-vortoj.html>
6. Samloke.
7. <http://bertilow.com/pmeg/gramatiko/rolmontriloj/n/tempopunkto.html>
8. http://bertilow.com/pmeg/skribo_elparolo/elparolo/specialaj_reguloj.html
9. Rokicki, Ryszard. *Akcento en kunmetitaj vortoj // La Ondo de Esperanto*, 2010, №1.
10. Kris, Alen. *Amaraj provoj // La Ondo de Esperanto*, 2006, №11.
11. Temas pri respondo de Michael Lennartz al la diskuto en *Libera Folio*: <http://www.ipernity.com/blog/41683/267942>
12. Citita laŭ: *Sankta amatoreco! — PMEG // Libera Folio*, <http://www.liberafolio.org/2010/>.

Nia Trezoro

En 2008 en *La Ondo de Esperanto* aperis ĉiumonata rubriko *Nia Trezoro*. Ĉi tiu kleriga rubriko celas doni al tiuj, kiuj jam senprobleme legas en Esperanto, la eblon konatiĝi kun la historio kaj kulturo de Esperanto. Dum la unua jaro en *Nia Trezoro* estis prezentitaj dek libroj, kiuj grave influis la evoluon de Esperanto lingve, socie kaj kulture. En 2009 la rubriko estis dediĉita al la Esperanto-gazetaro. En 2010 *Sezonoj* kunlabore kun la Litova Esperanto-Asocio eldonis ĉi tiujn tekstojn libroforme kiel *Dek libroj* kaj *Dek gazetoj*.

Dek libroj

Aleksander Korĵenkov. *La Unua Libro*
Halina Gorecka. *Fundamenta Krestomatio*
Andreas Künzli. *Fundamento de Esperanto*
Halina Gorecka. *PV... PIV... NPIV...*
Reinhard Haupenthal. *Parnasa Gvidlibro*
Andreas Künzli. *Enciklopedio de Esperanto*
Carlo Minnaja. *Plena (Analiza) Gramatiko de Esperanto*
Halina Gorecka. *Esperanta Antologio*
Andreas Künzli. *Esperanto en Perspektivo*
Reinhard Haupenthal. *Plena verkaro de L. L. Zamenhof*

Dek gazetoj

Aleksander Korĵenkov. *La Esperantisto*
Aleksander Korĵenkov. *Lingvo Internacia*
Andreas Künzli. *Esperanto*
Halina Gorecka. *La Revuo*
Halina Gorecka. *La Ondo de Esperanto*
Halina Gorecka. *Heroldo de Esperanto*
István Ertl. *Literatura Mondo*
Halina Gorecka. *El Popola Ĉinio*
Stella Meester. *Literatura Foiro*
Halina Gorecka. *Monato*

Mendu ĉe via kutima libroservo. Venont-jare estos eldonitaj kolektoj pri originalaj Esperanto-romanoj (2010) kaj pri Esperanto-eldonejoj (2011).

Duobla jubileo de Georges Brassens

Yvart kaj Brassens (Foto de Birgit)



Georgo Brasens (france: Georges Brassens [Jorj Brasens]) certe estas la plej grava kanzonisto-poeto de la 20a jarcento. Li postlasis proksimume 170 finitajn kanzonojn, preskaŭ ĉiuj ĉefverkoj, kaj kelkajn postmortajn tekstojn.

Trans lia verkaro kun grandaj literatura kaj muzika postuloj, necesas paroli pri la homo kaj la influo, kiun havis liaj “kanzonetoj” al la franca kanzonaro ĝenerale kaj ankaŭ al certa evoluo de la moroj en Francio.

Komence de la 1950aj jaroj liaj strofoj, aŭditaj ĉe la radio kaj ĉe la televido, alportis veran revolucion en la kutima aŭdvida pejzaĝo. Kaj kvankam liaj vortoj foje liberpensulaj ŝokis la burĝaron, lia personaĵo kun tiel apartaj fiziko kaj voĉo rapide ricevis favoron de la publiko.

Eblas kalkuli per centoj, eble eĉ per miloj tiujn, kiuj, inter ili ankaŭ mi, sub lia impulso ekverkis kanzonojn kaj ilin ekkantis akompanate sin per gitaro. Inter tiuj, kelkaj cetere vivis belajn karierojn.

Mi kelkfoje diris al li: “Georgo, pro ci mi fariĝis kantisto”, kaj senvarie li respondis al mi ridetante sub sia liphararo: “Ci volas diri, Galopĉjo, ke dank’ al mi ci profesiiĝis...”

Ĉi-oktobre memorfestiĝas la 30a datreveno de lia forpaso kaj ankaŭ la 90a de lia naskiĝtago. Ja Georgo Brasens hodiaŭ 90-jaras. Kaj daŭre li estas inter ni, eĉ se lia fizika ĉeesto mankas al ni. Efektive ne plu nombreblas dum tiuj ĉi lastaj jaroj la artistoj aŭ la grupoj, kiuj dediĉis centojn da diskoj al la verkaro de Brasens. Liaj kantoj estis adaptitaj kaj kantitaj en multaj lingvoj kaj multaj landoj, ekzemple ruse de Aleksandro Avanesov (6 KD-oj).

Brasens muzikisto

Eblas diri ke Brasens nobligis la poetan kanzonaron tiel pro la alta kvalito de la tekstoj kaj iliaj literaturaj referencoj same kiel pro la false simpla eco de la muzikoj ĉiam ellaboritaj. Ĉar ofte estas forgesita la muzikista Brasens. “Sen miaj refrenetoj, — li diris, — miaj kanzonoj perdus almenaŭ duonon de sia indeco”. Feliĉe nun ekzistas multaj registraĵoj fare de muzikistoj, kiuj aŭdeble kun granda plezuro interpretas la melodiojn de *Oĉjo Georgo* ofte evidentigante ilian “jazecon”.

Miaflanke, mi sentas veran feliĉon kantante Brasenson franclingve aŭ en Esperanto. Ni neniam kune parolis pri la universala lingvo, sed mi certas, ke li konsentus kaj aprobus la tre fidelajn adaptaĵojn de la tradukintoj. Mi ankaŭ pensas, ke li ne tro malkontentus pro mia interpretado...

Jacques Yvart

Georges Brassens

Oĉjo Leon’ (Le vieux Léon)

*Antaŭ jardek’
vi iris ek,
Oĉjo Leon’,
for de ni, ve!
al ĉiel’ de
l’ akordion’.
Vi flugis for
al ĉi lok’ por
kontroli, ĉu
l’ bal’ de Pariz’
en Paradiz’
reĝadas plu.
En ĉi azil’
kun muzikil’
– kia regal’! –
vi ludas plu
ĉe l’ rendevu’
de mortobal’.
Sen ironi’
ni preĝas pri
via pardon’
pro la skandal’
de malŝat’ al
l’ akordion’.*

*Malprave, ke
en maŭzole’
aŭ Panteon’
ne estas cel’
honoro de l’
akordion’.
Vi kuŝas, frat’,
sub grunda mat’
sen mort-emblem’,
sen liturgi’,
apologi’
kaj rekviem’.
Sed l’ amikar’
ĉe l’ mortoĉar’
ŝercadis por
per fantazi’
mokadi pri
prema dolor’.
Kaj veras, ke
por artist’ de
l’ akordion’
en nia skol’
pli varmas, ol
en Panteon’.*

*De kiam, frat’,
vin logis fat’
al transa mond’,
Fluadis sub
pontoj sen dub’
ondo post ond’.
La buboj el
nia parcel’,
nia kvartal’,
disiĝis for,
ĝin lasis por
alia stal’.
Sed sen perfid’
kaj sen likvid’
de l’ juna temp’,
plu restas mot’:
la miozot’,
nia printemp’.
Kaj larmas ni
pro nostalgi’,
Oĉjo Leon’,
se kun lancin’
aŭdigas sin
akordion’.*

*Ĉu ĝuas vi
en kompani’
de l’ anĝelar’?
Ĉu ties trup’
staras sur ŝtup’
de solidar’?
Ĉu ruĝa vin’
gajigas vin
kiel sur ter’,
dum sen problem’
Di’ zorgas mem
pri la ceter’?
Se lasas vin
eksbelulin’
kisadi ŝin,
vi certe ne
bedaŭras, ke
venis la fin’.
Kaj se al Di’
en ĉi medi’
l’ akordion’
sonas kun ŝat’,
kia beat’
por vi, Leon’!*

Tradukis Michel Duc Goninaz kaj Marcel Redoulez

Jacques Yvart [Ĵak Ivar] publikigis tridekon de diskoj, inter kiuj tri estas dediĉitaj al Brassens: unu en la franca kaj du en Esperanto.

Sidas mi en la plej luma, plej vasta kaj plej agrabla ĉambro de la Antverpena Esperantocentro. Dekstre de mia skribtablo, kun, kompreneble, komputilo estas impona librobretaro, kun multaj libroj. Tri el la bretoj estas okupitaj de **niaj propraj eldonoj**. Nur dekon da jaroj mi respondecas pri la eldonagado de FEL, kaj hodiaŭ mi, je mia miro, konstatis ke mi scias tre malmulte pri la jaroj antaŭ ol mi “respondecis”. Jen do! Ĉu Esperanto havas historion?

Mia ĉefo petis min verki artikoleon, panoraman, pri nia eldonado.

Prestiĝa rezidejo

Kio nepre tuj frapas ĉiun objektivan spektanton estas ke grava karakterizo de ĉio kio rilatas al nia eldono estas **prestiĝa!** Ni laboras — mi ŝatus skribi rezidas, sed PIV ne permesas al mi uzi la verbon en tiu senco — en klasikburĝa, impona konstruaĵo, ĉe la ĉefavenue de la plej grava flandra metropolo. Ofte vizitas nin eksterlandaj Esperantistoj, kaj tiam ni kun fiero montras al ili nian riĉecon.

Prestiĝa kresko kaj evoluo

Se oni bone informis min, nia unua lib(et)o aperis en 1982. Ĝi estis kompostita kaj enpaĝigita de la tiama Grafika Centro de UEA (en Antverpeno, sub gvido de Paul Peeraerts) sed presita de Torben Kehlet. Sur la kovrilo estis indiko, ke la eldonisto estis “Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno”. La verkinto estis Rik de Roover, kaj la titolo *La Aventuroj de Ŝpar- kaj Alia Porketoj*. Estas libreto taŭga por verdaj infanoj.

Rapide poste la Centro akiris presmaŝinon kaj povis mem zorgi presadon (sed ne bindadon) de libroj. FEL daŭrigis la honorigon de flandraj esperantistoj per aperigo de *Jaĥto veturas for... kaj veturigas la morton* de Deck Dorval (1983). Estis iu krimromano, kaj en nia eldonado poste ankaŭ nepre ne mankos la krimromanoj! Fama estas la serio de Ronald Cecil Gates, kiu aperis inter 1991 kaj 2006.

Transpreno de prestiĝa serio

Kelkajn jarojn poste, en 1983, ni akceptis transpreni la eldonon de la prestiĝa serio “Stafeto-libroj”, kies daŭrigo, post naskiĝo en la Kanariaj Insuloj (Régulo Perez) estis certigita de Torben Kehlet. La serion simbolas la bela konata ilustraĵo el la *Vivo de la Plantoj*. Unua libro en nia parto de la serio estis de Johán Valano *Ĉu rakonti*



novele? ... krimnovelaro. Sekvos multaj libroj al kiu nia prijuĝa komitato donos la honoron enlistiĝi en la serion. Entute ĝis nun, tridek kvin. Plejparte la “Stafeto-libroj” estas altvaloraj, prestiĝaj, originalaj verkoj, romanoj, novelaroj, aŭ eĉ teatraĵoj, sed tamen ni ankaŭ, pro diversaj kialoj, enigis gravajn tradukaĵojn.

Laŭrokrono de prestiĝaj stilistoj

Demandu al iu ajn Esperantologo citi la nomojn de niaj plej prestiĝaj kaj respektataj aŭtoroj, kaj vi certe aŭdos la nomojn de Anna Löwenstein, Lena Karpunina, Sen Rodin, Trevor Steele, Edwin de Kock, Chris Declerck... kaj li eble eĉ ne mencias — ĉar konsideros tro memevidentaj kaj konataj — Auld kaj Waringhien. De ĉiu el tiu ĉi listo de ok nomoj ni publikigis verkojn. Kiu kuraĝos diri ke li ne legis *Neokazinta Amo* (LK 2007), *Bildoj pri Norda Lando* (SR 2006), *La ŝtona urbo* (AL 1999), *Kvazaŭ ĉio dependus de mi* (T S 2009), *Spitaj — kiel hidrargo* (CD 2008), *Sub fremdaj ĉieloj* (EdK 2007), *Sub la signo de socia muzo* (WA 1987), *Beletro sed ne el katedro* (GW 1987)?

Prestiĝaj verkoj el monda literaturo

La rolo de nia lingvo en la diskonigo de la monda literaturo certe ne estis neglektita! Ie, iam, ial, iel ... Zamenhof skribis: “Seneko ne estas por ili tro serioza” (vidu PIV, ĉe Seneko) kaj FEL eldonis verkon de Seneko, en brila traduko de Gerrit Berveling, kiu parolas latinan same glate kiel esperantan. Ni eldonis la prestiĝan *Grafo de Montekristo* (A. Dumas/Moirand) el la franca, la faman *Venecio* de Th. Mann el la germana, *Pinokjo* el la itala; *Sagao de Njal* el la islanda, *Dormanta Hejmaro* el la

bengala. Se mi ne mencias la nomojn de aŭtoroj kaj tradukantoj... estas por ke vi ĝuu iom da ĝojo pro rekono kaj rememorero!

Prestiĝa saltobreto al tutmonda famo

Ni ne profitis nur de la gloro kaj aŭreoloj de famuloj, sed ankaŭ al junaj talentitaj homoj ni donis eblecon lanĉi sin! Juna afrika talento, Jean Codjo, publikigis ĉe ni libretojn, kiuj elstaras pro sia rekto, honesteco, malkaŝemo kaj kiuj donas rektan aliron al la koro kaj animo de la aŭtoro (i.a. *Dialogo inter surduloj*). Kaj li ne estis sola sur tiu saltobreto.

Nenio homa estas fremda al ni!

Por ni la mondo ne limiĝas al literaturo. Ankaŭ scienco estas io tre grava en la homa socio. Ni sukcesis konvinki Alberto Fernandez kunigi en unu libron, la plej interesajn kontribuojn kiujn li dum multaj jaroj aperigis en diversaj revuoj, kaj tiel naskiĝis *Kalejdoskopa Rememoro*, kun sciencaj kaj sociaj kontribuoj. Sed ni ankaŭ sukcesis eldoni tradukojn de prestiĝaj sciencaj verkoj, tutmonde admirataj. Kiam *Origino de Specioj* (Darvino/Klivo Lendon) estis prespreta, UEA decidis konsideri ĝin kiel numeron unu, en nova prestiĝa serio *Scienca Penso*.

Flego de prestiĝaj verdaĵoj

Ni ne forgesis ke ni apartenas al la Movado. Ni ĝojis ke ni povis, finfine, pli bone konigi filinon de Ludoviko Zamenhof, Lidja Zamenhof al la tutmonda esperantistaro. Ni eldonis tradukon de la angla biografio *Vivo de Lidja Zamenhof* sed ankaŭ lasis Lidja-n mem paroli en *Originala Verkaro de Lidja Zamenhof*. Tro malmulte estas sciata, ŝajnas, ke ni ankaŭ eldonis faksimilon de la *Unua Libro* en la franca. Plie aperis *Fundamentoj* en diversaj naciaj lingvoj, kaj diversaj pliaj estas prespretaj. Baldaŭ ni aperigos libron pri kiu Zamenhof, la patro kaj la filo, revis: apudmeto de la *Proverbaro* de patro kaj filo (oklingva). Kaj baldaŭ iros en presadon, nova, moderna eldono de Esperanta Bildvortaro, kiu certe trovos ĉe multaj sian lokon apud la kara PIV.

Ni konscias ke la estonto de paperlibroj iĝas duba... sed esperas ke paperlibroj iĝos prestiĝaĵoj. Tamen jam en 2008 ni vendis bitlibrojn (e-librojn) kaj nepre daŭrigos fari tion.

Ni ne sukcesis mencii eĉ nur la sesonon de la prestiĝaj verkoj kiujn ni aperigis, kaj nur povas inviti vin daŭrigi esploradon en niaj retpaĝoj:

www.esperanto.be

Petro Desmet'

Festo de la Esperanta Kinaro

Kiom da filmoj en Esperanto vi spektis? La facila demando kaŭzas ĉe averaĝa esperantisto malfacilajn pripensojn. Mi dubas, ke tiu kvanto superos kvin. Bedaŭrinde, kinaro estas neglektata de la Esperanto-komunumo, kiu daŭre vivas en la teksta mondo. Kaj la tekstoj jam dum kelkaj jardekoj ne havas influon al eksteraj homamasoj.

La modernaj teknologioj kaj modernaj manieroj de distribuado permesas al amatoroj krei kaj distribui aŭdvidan kulturon. Kaj foje evidentiĝas, ke ne grandaj filmoproduktantoj, sed jam kutima interreto liveras al ni aparte talentajn homojn, kiuj inspiras aliajn ktp.

Ĉu eble valoroj, kiujn propagandas esperantistoj, jam meritis esti esprimataj per movbildo?

La krea unuiĝo *Filmoj sen limoj* estis kreita ĝuste por krei modernajn aŭdvidajn materialojn komence surbaze de jam kreitaj verkoj kaj poste krei proprajn filmojn.

Kiel logika kaj natura daŭrigo de la dujara agado de *Filmoj sen limoj* naskiĝis projekto okazigi la unuan Esperantan [Kinofestivalon](#). La evento neniam antaŭe okazinta en Esperantujo devis plenumi kelkajn celojn: unue, motivigi esperantistojn krei videan materialon; due, kolekti kaj prezenti modernajn filmojn pri kaj en Esperanto; trie, rompi la ekzistantajn stereotipojn kaj imagon pri la mondo de esperantistoj kaj neesperantistoj. Do, la kinofestivalo okazis de la 10a ĝis la 13a de

julio 2011 en San-Paŭlo (Brazilo) dum tri samtempaj grandaj kongresoj: Tutamerika Kongreso de Esperanto (TAKE), Brazila Kongreso de Esperanto (BKE) kaj Brazila Esperantista Junulara Kongreso (BEJK).

De la 1a de aprilo ĝis la 20a de junio 2011 ĉiu deziranto povis partopreni konkurson kaj produkti videojn kun daŭro 5, 15 aŭ 30 sekundoj. Tiuj filmoj konsistigis la konkurso programon de la kinofestivalo. Dum du monatoj ni ricevis 21 videojn el 13 landoj.

Pri la nekonkursaj filmoj ne estis manko al ni, kiel eventuale oni povus imagi. Ni sukcesis kolekti 15 filmojn el sep landoj.

La ĉefa temo de la malferma kaj ferma filmoj estis la aspekto de Esperanto kaj Esperanto-komunumo per la okuloj de neesperantistaj filmoproduktantoj. La dokumenta filmo *The Universal Language* (La Universala Lingvo) de la usona reĝisoro Sam Green, aŭtoro de *Utopio en kvar movimentoj*, prezentis la ideon de internacia lingvo pere de intervjuoj kun esperantistoj, ĉefe filmitaj dum la 92a Universala Kongreso en Jokohamo, kaj famaj esperantistoj kiel Humphrey Tonkin kaj Renato Corsetti. La filmo montris sian aktualecon kaj diferencon inter la imagoj de esperantistoj kaj deekstera aspekto. La kongresa publiko splitiĝis je du partoj: ŝatantoj kaj malŝatantoj de la filmo. Post la filmoprezento okazis sufiĉe interesa diskuto inter la spektantoj pri la temo *Ĉu esperantistoj trompas sin?*

La ferma dokumenta filmo *Esperanto* de franca reĝisoro Dominique Gautier, farita laŭ mendo de Sennacieca Asocio Tutmonda, enhavis ĉion por kontentigi la mendanton. Ĝi prezentis alian vidpunkton pri Esperanto, ĝuste tiun, kiun ni kutimas aŭdi de esperantistoj, en Esperantaj revuoj kaj dissendolistoj. Ankaŭ ĉi tiu filmo vekis diskuton inter ĉeestantoj. Kaj ni esperas, ke baldaŭ ĉiu deziranto povus kompari tiujn filmojn.

La mallongaj ludfilmoj *Conlang: the movie* (Planlingvo: la filmo) de usona reĝisorino Marta Masferrer, *Que sera, sera* de norvega reĝisoro Geir Greni, *Senmova* de turkia reĝisorino Tuğçe Madayanti Sen, profesie produktitaj dum la lasta tempo, enhavas temojn pri Esperanto kaj esperantistoj. La unuan

fojon oni povis spekti la unuan profesian animacian mallongan filmon *Ĉapeloj* de Simmon Keith Barney el Usono sur granda ekrano.

La programon de naciaj filmoj konsistigis la novega dokumenta filmo *Polaj Spuroj* de Rogener Pavinski (Brazilo), kiu, laŭ nia opinio, meritas ĉeston de naciaj kaj internaciaj kinofestivaloj; ĝi prezentis la historion de polaj enmigrintoj en Argentino dum la dua mondmilito. Alia dokumenta filmo *Jatir ja tajer, Vojaĝo en Palestino* prezentis la longdaŭran israelan-palestinan konflikton de la malofte aŭdata vidpunkto de palestinanoj. Multaj spektantoj diris, ke la filmo ŝanĝis ilian opinion pri la konflikto.

La arta programo konsistis el ne malpli interesaj filmoj. *Atako de lunaj zombioj* de la usona reĝisoro Christopher R. Mihm estis dublita en Esperanto. Ĝin prezentis en la kinofestivalo Duncan Charters, kiu dublis unu rolulon en Esperanton. Mallongaj filmoj de la germana reĝisoro Martin Schreier ne nur vekis intereson de la spektantoj, sed eĉ la plendon pri tio, ke estis prezentita erotika filmo kun subtekstoj en Esperanto.

Per tiu kolekto de mallongaj filmoj ni tute neatendite rompis la stereotipon pri tio, ke Esperanto estas sankta lingvo, lingvo por bonaĵoj kaj pozitivaj temoj. Kaj pri tio ni plenkore fieras.

Mallongaj filmoj de Martin Schreier iom neatendite vekis grandan intereson.



La pinto de la festivalo iĝis la 40-minuta arta danca filmo *The Cost of Living* (La kosto de vivado) de la brita reĝisoro Lloyd Newson. La filmo estis varme akceptita pro ĝia nekutima prezento de aktualaj temoj pri diskriminacio de handikapuloj, samseksemuloj kaj liberaj artistoj.

Al la festivalo venis filmoprodukta kompanio *SET Cavalheiro*, kiu konsistas el la filma Esperanto-familio Cavalheiro. La patro Pedro Cavalheiro estas fama brazila esperantisto, tradukisto kaj artemulo, Olavo Cavalheiro estas aktoro, kaj Heitor Cavalheiro estas fakulo pri specialaj efektoj. Olavo kaj Heitor estas denaskaj esperantistoj. Dum viva renkonto kun ili ducento da kongresanoj eksciis multon interesan pri filmoproduktado en Brazilo, spektis vivajn specialajn efektojn: sekuran flamon, artefaritan neĝon, flugantan junulinon k. a.

Krom distrajn programerojn la partoprenantoj povis viziti kadre de la programoj de TAKE kaj BEJK prezenton de Verda Filmejo, metiejon pri subtekstigado, prelegon pri problemoj de aŭtoraj rajtoj kaj libera kulturo kaj la interagan metiejon *Esperanta kinarto*. La plej kreema arto.

Malgraŭ kelkaj malglatadoj la spektantoj estis ravitaj, kaj en siaj enketaj respondoj ili vidas la aranĝon memstara arta kultura evento kun diversspecaj artaj metiejoj kaj prezentoj.

La kinofestivalo ne povus okazi sen helpo de niaj partneroj. Ni kore dankas al TEJO kaj E@I pro la subteno de la konkursa programo, al la germana fondaĵo FAME kaj privataj personoj, inter kiuj estas Jader Rodrigues da Silva (Brazilo), pro la subteno al la nekonkurso programo. Dum la tuta periodo de la konkurso de Esperanta Kinofestivalo nin informade subtenis la podkasto *Varsovia Vento* kaj la revuo *Kontakto*.

La organizantoj estas kontentaj kaj jam esploras la lokon por la sekva Esperanta Kinofestivalo. Ĉu ĝi okazos? Tio dependas de esperantistoj kaj de entuziasmo de ĝiaj organizantoj, sed jam nun ni povas diri, ke la evento povus montri Esperanto-movadon per aliaj rimedoj al la ekstera mondo, kiu kutimiĝis al profesiaj aŭdvidaj materialoj.


Longas la vojo de Esperanta kinarto al profesiaj filmoj, sed ni esperas, ke tio okazos iam en la proksima estonteco. Ni devas kolekti niajn fortojn por efektiviĝi plej kuraĝajn ideojn. Ĉiu el ni povas helpi kaj krei laŭ sia kapablo kaj maniero. La tempo venis.

Aleksander Osincev

Ja vere tutkore kaj eĉ belvoĉe!

Manŭel. Duonvoĉe... tutkore: KD. — Udine: Emanuele Rovere, 2011.

La aŭtoro de tiu ĉi ĉarma albumo, italo Emanuele Rovere, laŭ lia propra priskribo, prezentita en la enkonduko, estas amatora muzikisto, kiu de sia junaĝo ŝategis muzikon kaj eĉ ludis en “bonkvalitaj amatoraj grupoj”.



Tuj sentebles, ke la aŭtoro ne nur ŝatas muzikon, sed ankaŭ havas bonan guston pri belaj melodioj. Kaj malgraŭ ĉiuj aŭtoraj sinpravigoj (de la speco “mia nuna voĉo estas nur pala ombro de la iama”) lia kantmaniero estas sufiĉe interesa, iom diskreta, sed tamen dolĉe intima kaj vere tutkora. La rezulto de tiu miksaĵo de popularaj kaj vere belaj melodioj, prezentitaj de sincera voĉo kun ĉarma Esperanto-prononco estas ja ege bona!

La albumon konsistigas la Esperantaj tradukoj (plenumitaj de la aŭtoro mem) de diversaj popularaj ital- kaj (foje) angla-lingvaj kantoj, inter kiuj troveblas veraj internaciaj ŝlagroj. La itala (aŭ napola, se paroli mallarĝasence pri kelkaj el la muzik-pecoj) muzika tradicio ja estas tutmonde agnoskita kaj ŝatata; kelkajn el la prezentitaj kantoj mi ŝatas eĉ en la rusaj tradukoj kaj plenumoj.

Ĉiuj kantoj estas leĝeraj, helaj kaj melodiazaj; la muzik-aranĝoj eble sonas iom simple (ĉar parte sintezilecaj), tamen sufiĉe akorde kaj ege harmonie kun la voĉo de la kantisto. Tekste plej ofte en ili temas pri la amo, sed foje ili tuŝas ankaŭ la sociajn demandojn, kiel en la kanto de Adriano Celentano kaj

Mari- ano Detto “La knabo de strato Gluck”. Inter la aliaj famegaj kantoj mi nepre menciu “Nun aŭ neniam” (kiu estas iom libera adapto de la mondfama kanto de Giovanni Capurro kaj Eduardo di Capua “Ho sole mio”), “Ŝin mi amas” (adapto de la kanto de *The Beatles* “And I Love Her”) kaj la kanton de Stevie Wonder “I Just Called to Say I Love You” (la titolo de la adapto — “Vokis mi nun por diri, ke mi amas vin”). Ankaŭ la kanto “Rezignu” (iom libera adapto de la mondfama “Torna a Surriento” verkita de la fratoj De Curtis) tre agrable kaj eĉ kortuŝe impresis min.

La elekto de la muzika materialo estas do tute senripoĉa kaj eĉ laŭdinda; eĉ por mia 30-jarula orelo la nostalgiazaj sonoj de la popularaj kantoj de la 20a jarcento sonas ege plaĉe. La muzika prezento kaj la voĉo de la kantisto, kiel jam dirite, estas eble iom diskretaj, sed tute harmoniazaj kaj agrablaj.

Koncerne la tradukojn, ili ĉiuj estas relative simplaj kaj klaraj lingve, kvankam foje eĉ tro liberaj rilate al la enhavo (kelkajn tradukojn mi komparis laŭ miaj povoj kun la originalaj kaj alilingvaj tekstoj — la konkludo estas, ke indas paroli pli verŝajne pri la Esperanto-adaptoj, ne pri la tradukoj); foje la tekstoj trouzas adasismojn kaj simplegajn rimojn (ekzemple: “mi — vi” aŭ “min — sin”), ankaŭ la ritmo estas multloke “tre loza”, tamen — feliĉe! — la tradukinto sukcesis eviti misakcentojn kaj perditajn akuzativojn.

La diskon akompanas tekstolibreto (kun kelkaj mistajtoj kaj iom stranga maniero transskribi la proprajn nomojn — ankaŭ la nomon de la kantisto, kiu estas prezentita kiel “Manŭel”). Kiel apartaj muzikaj trakoj (ne kiel mp3-dosieroj) estas prezentitaj ankaŭ la karaokeaj versioj de ĉiuj kantoj. Fine mi diru, ke la prononco de la kantisto estas mirinde klara, kio plifirmigas la ĝenerale bonan impreson pri la albumo.

Resume do dirindas, ke la albumo malgraŭ la iom simpla prezento kaj senartifika aspekto nepre meritas la atenton de tiuj, kiuj ŝatas belajn kantojn aŭ eĉ simple bonan muzikon — la elekto kaj la plenumo de la melodiazaj kaj sinceraj kantoj neniam lasos senemocia.

Paŭlo Moĵajev

**La abontarifo
de La Ondo de Esperanto en 2012
denove restas la sama. Tuj (re)abonu!**

FESTO: moderna muziko en malnova kastelo

Post la sukcesega FESTO 2010 en Donnevillo ĉe EUROKKA/Vinilkosmo estis malfacile fronti novan defion por 2011, tamen la organiza teamo kuraĝis prepari FESTON 2011. La teamo stariĝis ĉirkaŭ la kerno de JEFO kun la partnereco de EUROKKA por la arta programo. Taŭga loko estis trovita en la Esperanta Kastelo Greziljono ĉe Baugé en la Luara valo, vera pilgrima loko por esperantistoj el la tuta mondo. Somere 2006 tie jam okazis FESTO.

Ĉi-jare estis instalitaj du scenejoj: la ĉefa en la malantaŭa korto de la kastelo subĉiele, kaj la pli eta scenejo en la plej granda ejo apud la kastelo funkciis, kiam la granda scenejo ne povis esti uzata pro pluvo. La drinkejo funkciis ĉefe nokte kvazaŭ drinkeja dancejo por la noktemuloj kaj bieremuloj, kaj en la pli trankvila gufujoj oni babilis, teumis kaj umadis ĉe kandeloj.

Tagaj programeroj ne estis tre pezaj, kelkaj atelieroj: kantado, ĵonglado, promenado, prelegoj, sportumado kaj ekskursiva tago en la kasteloj Ussé kaj Brissac. Post la vespermanĝoj ekis la vesperaj programoj.

La unua vespero (lunde, la 8an de aŭgusto) estis interkona kun ludoj por interkonatiĝi; por malkovri la kastelon kaj ties ĉirkaŭaĵojn la partoprenantoj serĉis la kastelan fantomon... La vespero finiĝis en la drinkejo ĉirkaŭ Emĉjo kiu gitarludis kaj Kvenĉjo kiu akordionis kunkantigante la tutan ĉeestantaron ĝis malfrunokte.

Marde estis prezentado de FAMo kaj Tarek el Parizo. La duopo enkondukis kanzonan repertuaron per akordiona akompanado (FAMo) kaj darbuko (Tarek) por ritmigi kaj kadencigi la

komponaĵojn de FAMo aŭ tradukitajn kantojn el franca kanzonaro. Sekvis post FAMo hiphopa koncerto de Platano, la repisto de *La Pafklik*. Li entuziasmigis kaj dancigis la homojn, kvankam pro klaviklo, rompita en la Kieva IJK, li devis repi kun brako blokita. Jen talenta repulo repumanta eĉ nur unubrake!

Merkrede, post fajna preparado de la ekstera scenejo kun kolora lumigado de la kastelo kiel malantaŭa fono de la scenejo, ekis koncerto de la jam fama Pariza pianisto-kantisto Gijom kun tre personaj kanzonaj komponaĵoj. Lia koncerto interplektiĝis kun la sekva de la svedoj el *La Perdita Generacio*, kaj okazis komuna parto pere de fabela sciencfikcia kanta rakonto.

La koncerto de *La Perdita Generacio* (LPG) estis sukcesa. Multaj novaj kantoj buntigas la repertuaron, kaj jam estas materialo por nova albumo. La sveda bando varmigis la eksteran scenejon kaj plian fojon dancigis la publikon ĝis laciĝo. Postnoktomeza spektaklo-fino forpuŝis la partoprenantaron en la drinkejon kaj gufujon...

Ĵaŭde, post la ekskurso en la kasteloj, oni povis malkovri sur la ekstera scenejo la kvinopan italan bandon *Rêverie* kun progresiva folk-baroka stilo. La muziko vagadis inter la kastelo kaj la herbejo kie homoj sidis kaj kuŝis, atente aŭskultante la muzikon esplorante la stelojn en la ĉielo. *Rêverie* prezentis sian tute freŝan albumon *Revado*: revada magio, la kastelo, la muzikistaro, la lumoj sub la steloj... la vagada muziko kun riĉaj komponaĵoj multinstrumentaj kaj ensorĉa ina voĉo...

Vendrede la roka vespero surscenejigis la germanan inan bandon 42, kiu

konsistas el la du fratinoj Helen kaj Hanna Geyer, kiuj ellasis rokgrunĝan sonon el siaj elektra gitaro kaj drumo, por kelkaj kantoj Johanes Müller gastis kiel basisto..

Duaparte *Scarlet* el Angers ofertis viglan elektro-rokkoncerton. *Scarlet* estas promesplena bando kiu tre verŝajne elmergiĝos el la franca scenejo, kvankam la kantistino Dorota estas pola kaj kantas en la angla.

Sabate la ĉefa scenejo migris al la granda salono pro malbona vetero, kie anstataŭ la anoncita juna regeulo Jonny M, kiu ne povis veni, LPG faris sian duan koncerton, malsaman ol la unua, kun nova kanto kreita en Greziljono. Kaj ili sukcesis: la ekstera koncerto de LPG estis bonega, sed la endoma koncerto estis fajrigo! Imagu la plenŝtopitan grandan salondon de Greziljono, la tuta salono varmege dancis kaj vibris, kvazaŭ la bando kaj la publiko estis unu sola estaĵo... Neforgesebla etoso..

Post LPG surscenejiĝis *Inicialoj de* — la frankfurta elektropopa artisto. Lia koncerto okazis en du partoj. La unua parto estis pop-eca kun trankvilaj melodioj ripozigaj. Surekrane filmoj sinkroniziĝis kun la muziko, kiel por muzika kinejo. La dua parto iĝis diskejo kun pli elektronikaj kaj sekvencitaj ritmoj dancallogaj, kaj fine de la koncerto homoj volis danci pli kaj pli...

La koncertejoj postkoncerte transformiĝis al diskejo, kaj ĝis la 3a horo nokte la sonteknikisto Flo iĝis DJ per nur Esperanto-muziko... Vera espoteko! Post la 3a la festo daŭris en la drinkejo kaj en pli ŝveba etoso en la gufujoj.

Dimanĉe okazis la internacia vespero en la granda salono kun multaj kontribuantoj po unu aŭ du numerojn.. kaj fine la kantateliero prezentis kelkajn kantojn kiuj estis prilaboritaj dum la semajno...

La fermo estis gaja, kaj partoprenantoj petis pli longan aranĝon kvazaŭ ili ne volus forlasi la Festecan moĵosan etoson.


Okazis kunveno por preparoli la venontan FESTO, kaj abundis ideoj kaj proponoj. FESTO 2012 estas jam sur la reloj, kaj plej verŝajne ĝi okazos proksime de Strasburgo ĉe unu aŭ alia flanko de la limo, centre de Eŭropo por esti pli facile atingebla de ĉiuj. Estas antaŭvidata granda FESTO (antaŭ la fino de la mondo!). Jam rezervu unu semajnon kompletan aŭ eĉ pli por la evento dum venonta aŭgusto!

Flo!

Sur la foto estas *Rêverie*, kies koncerto konvenis por la kastela etoso. (*Nicolas de Buyl*)



Beletra Almanako, Junio 2011



Originala prozo ĉeestas en la dek-unua *Beletra Almanako* per mallongaj verkoj de Jakvo Schram, Mikaelo Bronŝtejn kaj Cindy McKee. Liven Dek, Jorge Camacho, Cindy McKee, Tacuo Huĝimoto kontribuas poezie.

Oni trovas du tradukitajn prozaĵojn: *Ronde, ĉiam pli proksimen* de Vladimir Colin (el la rumana Jozefo E. Nagy) kaj *Neverŝajna rakonto* de Bouba Rimbaud (el la hispana Jorge Camacho). Tradukita poezio venas de Iulian Tănase (Ionel Oneț el la rumana), Gerður Kristný (Baldur Ragnarsson el la islanda).

La Generacio de 1927 kaj la tradici-tipa kastilia liriko estas originala eseo de Miguel Fernández. Per la traduko de István Ertl oni konatiĝas kun la eseo *Unu nekredbla Facebook-vivo en sesdek unu simplaj meditoj* de la nederlandano Arjen van Veelen.


La sekcio artikoloj prezentas legaĵojn diverstemajn: Renato Corsetti kaj Sen Rodin debatas pri neologismoj; Cindy McKee prezentas sian retejon Verkoj.com. Per la tradukoj de Joxemari Sarasua aperas *Laŭdo de fikcio* de Bernar Freiria kaj *Mirigu mino* de César Mallorquí. Sen Rodin en *Kion ni faru?* meditas pri la nuna politika situacio en Italio. *Mensa malsano* de Pedro Hernández Ŭbeda pritraktas depresion. Julia Sigmond esprimas sian opinion pri la unuaj dek numeroj de BA.

Da recenzoj aperas malpli ol en la recenzoriĉa deka BA. Jozefo Horvath recenzas du romanojn de Stephan Lang: *La Transilvania nupto* kaj *La talpoĉasisto*. Anna Löwenstein analizas la duvoluman tradukon de *La grafo de Monte-Kristo* de Dumas. Einar Faanes prikonsideras la dulingvan verkon (Esperanta kaj norvega) *La postcifereca manifesto* de Rasmus Fleischer publikigitan kiel pdf-dosiero. Joxemari Sarasua aŭtoris recenzon pri *Blanko sur nigro* de Rubén Gallego, kaj Jorge Camacho pri *Sagao de Njal* kaj pri *Vundebla loko* de Gerður Kristný.

En la fino oni trovas recepton de sunflora kuko de José Manuel Martín en la traduko de Jorge Camacho. Fotoj de José Manuel Martín trafe ilustras ĝin.

Halina Gorecka

Palto - nova senpage e-libro



La kolekton de elektronikaj libroj de *Sezonoj* pliriĉigis *Palto* (Ŝinelj) de Nikolaj Gogol — unu el la plej legatataj ruslingvaj noveloj. Ĉi tiun “Peterburgan novelon” de Gogol tradukis en Esperanton Aleksander Korĵenkov. Lia traduko estis unue publikigita en la fundamenta kolekto *Rusa Novelaro* eldonita de *Sezonoj* antaŭ ok jaroj.

Palto estas senpage elŝutebla en la formatoj (dosierformoj) pdf kaj epub en nia kiosko: <http://esperanto.org/Ondo/Libro/Libro.php>

Palto estas la dek-unua eldonaĵo en la e-libra kolekto de *Sezonoj*. La statistiko montras, ke je 9 sep 2011 oni elŝutis entute 10 mil 576 ekzemplerojn de e-libroj.

Helpo al Esperanto-bibliotekoj

Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen helpas denove Esperanto-bibliotekojn por pliriĉigi siajn kolektojn. Tiu fondaĵo de UEA subtenos ĉi-jare jam por la 15a fojo bibliotekojn, kiuj ne estas financataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco. Lastjare naŭ bibliotekoj ricevis librojn je la valoro de 100 ĝis 200 eŭroj.

Por peti subvencion, oni sendu priskribon pri la biblioteko kaj liston de dezirataj libroj. Diskoj k. a. ne-libraj varoj ne estos konsiderataj. La petoj atingu la Centran Oficejon de UEA ĝis la 15a de oktobro papere (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando) aŭ rete al direktoro@co.uea.org.

Kun la vivo kaj agado de la dana Esperanta poeto Poul Thorsen (1915–2006), kiu kun sia edzino donacis la bazan bonhaston de la fondaĵo, eblas konatiĝi per la retejo www.poulthorsen.dk.

GK UEA

Literatura Foiro, 2011, №251

La junia *Literatura Foiro* (№251) omaĝas al Leen Deij, kies laste verkita poemo *La vojaĝo* uverturas. Sekvas la oracio de Giorgio Silfer. Leen Deij al estas per du posteumaj kontribuoj: sociologia eseo *La teorio pri rompitaĵoj glacoj* kaj la poemo *Civita kanto*.

Walter Ŭelazny analizas eksterordinaran detalon en la filozofio de Zamenhof — la signifon de la nocio *golus*, kiun li neniam esperantigis. Pri la lasta internacia PEN-konferenco en Slovenio raportas Giorgio Silfer. Perla Martinelli analizas la rezulton de la voĉdono por la premio *La Verko de la Jaro 2010*. En estas kvar poemoj de Peter Browne.

Multe pri la monda literaturo. Gastas la Nobel-premiito Orhan Pamuk per el-tiraĵo el respondoj dum sia publika renkonto kun studentoj en Sofio pasintan majon. Marie-France Conde Rey serĉas respondon al soci-historia demando, “Ĉu ĉio estas pardoninda al granda verkisto?” en 2011. José Wendell P. Capili verkis pri diasporaj verkistoj en Aŭstralio (tradukis Donald Broadribb), Manuel de Seabra pri la magiistoj kaj la drogoj de J. B. Priestley. Gastas la konata serba verkisto Mihajlo Pantiĉ per sia humuraĵo *Ridiga rakonto* (tradukis Ljubomir Trifonĉovski). Sneĵinka Angelova recenzas la ĵus eldonitan libron *Koncerto por kontrabaso kaj verda herbejo* de Cvetan Denev.

Abundas datrevenoj en 2011: pri la esperanta centjariĝo de Baghy, Kalocsay, Szathmári kaj Schwartz eseas Giorgio Silfer. Pri la naska centjariĝo de Károly Fajszki — rimporetro verkita de Márton Fejes.

Al la 251a *Foiro* kontribuis ankaŭ László Radacsy, Koffi Gbeglo, Armando Zecchin, Zofia Banet-Fornalowa.

HeKo

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Sendependa internacia revuo en Esperanto kun legantoj en 65 landoj!

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

Nekutima abonstatistiko

En la marta *Ondo* aperis nia kutima abonstatistiko por la jaroj 1998–2010. Laŭ ĝi dum la 13 eldon-jaroj ni ricevis sume 6005 individuajn kotizojn el 55 landoj. Plej multaj kotizoj dum tiu tempo venis el Ruslando – entute 1354 (22,5%). Sed la procentaĵo de la Ruslandaj abonantoj malkreskas: de 51,9% en 1998 ĝis nur 15,3% en 2010. Pli ol 200 abonoj dum 1998–2010 estis kolektitaj en dek landoj

Ruslando	1354	Finnlando	273
Pollando	618	Britio (UK)	266
Francio	356	Svedio	225
Germanio	353	Brazilo	223
Usono	292	Italio	217

Malgrandaj ne povas superi la grandajn laŭ la abonkvanto, sed la relativan staton vidu en la suba statistiko pri nombro da abonoj por unu miliono da loĝantoj, pagitaj dum 1998–2010. (Nur landoj kun pli ol 25 abonoj entute). Da tiuj landoj estas tridek. Jen la listosupro:

1. Islando 151,4 (48 abonoj / 0,317 mln)
2. Finnlando 50,6 (273 abonoj / 5,39 mln)
3. Estonio 40,2 (54 abonoj / 1,34 mln)
4. Litovio 27,7 (92 abonoj / 3,32 mln)
5. Svedio 24,1 (225 abonoj / 9,34 mln)
6. Danlando 19,1 (106 abonoj / 5,53 mln)
7. Belgio 17,0 (184 abonoj / 10,8 mln)
8. Latvio 16,5 (37 abonoj / 2,24 mln)
9. Pollando 16,2 (618 abonoj / 38,1 mln)
10. Svislando 14,8 (115 abonoj / 7,78 mln)
11. Kroatio 12,8 (57 abonoj / 4,43 mln)
12. Norvegio 12,3 (61 abonoj / 4,96 mln)
13. Ruslando 9,47 (1354 abonoj / 143,0 mln)

Same kiel antaŭ kvin jaroj, kiam ni unuafoje faris tian esploretan, okulfrapas la eŭropeco de la listo kaj la popular-eco de *La Ondo* en la landoj nordiaj kaj baltaj. En Islando la probableco renkonti abonanton de *La Ondo* estas, ekzemple, 160-oble pli granda ol en Usono.

Se en la tuta mondo oni abonus same aktive kiel en Islando (unu abono dumjare por 84 mil loĝantoj, aŭ 11,65 abonoj por unu miliono da loĝantoj), *La Ondo* havus pli ol 80 mil abonantojn en la tuta mondo, inkluzive de ĉ. 1600 en Ruslando kaj ĉ. 3600 en Usono. Jen laboro por nia ekspedisto! **.AIKO**

Juda humuro

La fonto sekigis

Bronka sidas en Tel-Aviva kafejo. Pasas ŝia amikino Henja, kiu vidas, ke ŝi estas tre malgaja.

Henja: “Kio okazis, karulino?”

Bronka: “Nu, antaŭ tri monatoj mia patrino mortis kaj postlasis al mi 50 mil siklojn.

Henja: “Ho, mi bedaŭras aŭdi. Mi kondolencas vin”.

Bronka: “Kaj antaŭ du monatoj mia patro mortis, postlasinte al mi 30 mil siklojn.

Henja: “Ho, terure. Akceptu miajn kondolencojn”.

Bronka: “Kaj antaŭ unu monato mia onklino mortis kaj postlasis al mi 20 mil siklojn.

Henja: “Kion vi rakontas?! Tri kazoj de morto dum tri monatoj. Terure!”

Bronka (*preskaŭ ploranta*): “Jes. Kaj ĉi-monate nenio!”

El la kolekto de **Josef Ŝemer**

Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Ĉiujn ĉi-monatajn preskerarojn rimarkis kaj rimarkigis Lu Wunsch, kiu ŝatas ĉasi precipe en diskutlistoj. **István Ertl**

La revo de kreditoroj

Kelkloke esperantistoj ŝatas mem inviti ĵurnalistojn margene de pli vastskalaj aranĝoj kiel Tago de Pago, Europa Tago de Lingvoj. (Barbara Pietrzak, 9 sep 2011, yahoo-grupo informado, mesaĝo 1960)

Ĉia helpo bonvenas

... Ŝmigielski ... petas helpon al NE-FAKULOJ kaj fekuloj pri la temo “investo en vinoj”. (Bert Schumann, 5 apr 2011, google-grupo komerco, temo “pola vin-demando — kun forgesita ligilo”)

Ĉiam la sama furaĝo

Trian fojnon EN UZBEKISTANO. (Eugenio S. Perever-tajlo, 19 feb 2011, yahoo-grupo reago, mesaĝo 10489)

Pusaj gruzoj

En Kartvelio ĉiuj normale parolas pusan kaj junuloj scipo-vas ankoraŭ anglan. (Olga Bauer, 25 jan 2011, google-grupo vojaĝanto-per-esperanto)

Kiu aktive vivas, duoble ivas

Iniciata grupo “Esperanto por EU” kaj aktivululoj de venonta pola EDE organizis unuan kultur-politikan aranĝon. (Stanisław Rynduch, ipernity.com/blog/96201/archive/2010/8/22)

“Vi verkas librojn pri la demando, kial vi librojn verkas”

La “Diskutlibro pri malpli uzataj libroj”, eldonita de UEA, okupas privilegian lokon sur mia libroŝranko. (Johan Derks, 28 feb 2011, yahoo-grupo komitato-de-uea, mesaĝo 5274)

Felise!

La katistino Agnieszka Hekiert prezentis kun la jazbando de Laslo Zadlo la esperanta versio VOJO66 de ROUTE66. (“Karl el Germering”, 24 sep 2009, yahoo-grupo esper-german)

Astronomie pri eraroj

... en la kometoj de la menciita blogo estas indikoj al pliaj eraroj. (Roland Schnell, 29 sep 2009, yahoo-grupo esper-german)

Rigardo, ĉu el Piza turo?

... ni ĝojas renkontiĝi kun Allan Delmotte el Belgio... Liaj impresoj malkovras — eĉ por ni surpizan alrigardon al kelkaj facetoj de poloj kaj Pollando.

(Esperanto-Redakcio de Pola Radio, 23 apr 2009, yahoo-grupo per-esperanto-radioj, mesaĝo 1385)

La Ondo invitas al kunlaboro en Mozaiko tiujn, kiuj povas kompili krucvortenigmojn, ŝaradojn kaj aliajn enigmojn. Ankaŭ pentristoj kaj karikaturistoj estas serĉataj. Skribu al ni rete: sezonoj@kanet.ru.

Perantoj de “La Ondo de Esperanto”

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo – Mendoza

Aŭstrio: Leopod Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio: FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

Brazilo: BEL, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-900 Brasília-DF

Britio: EAB/Viv O’Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

Bulgario: Georgi Mihalkov, “Nadejda” V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

Estonio: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

Finnlando: EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

Hispanio: Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

Hungario: HEA, Pf. 193, HU-1368 Budapest
KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Islando: IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

Italio: IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano
Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

Japanio: JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tôkyô-to, 162-0042

Katalunio: KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

Kroatio kaj Slovenio: Višnja Branković (vd. Italio)

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga

Litovio: LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

Nederlando: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

Norvegio: Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

Nov-Zelando: G.David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, North Shore City, NZ-0630

Pollando: PEA, Aleja Wolności 37F/7, 33-300 Nowy Sącz

Portugaliao: PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

Ruslando: Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

Serbio: Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

Sud-Afriko: Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

Svedio: Lisbet Andréasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

Usono: ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530



Esperanto-urbo. Rezentantoj de la granda muzikprojekto *Niedersachsen singt* venis al Herzberg por registri paroladon kaj kanton en la Internacia Lingvo kadre de la kolektado de tipaj sonoj kaj kantoj por la publika sonatlaso. Aktivuloj de ICH kaj alilandaj gastoj volonte kantis por ili. (*ICH*)



Ukrainio. 11 turismemaj esperantistoj el tri landoj partoprenis en la 4a turista marŝo “Milan Zvara”, omaĝe al la fama slovaka esperantisto. La pli ol centkilometra itinero startis de la vilaĝo Dovhe, kie naskiĝis Milan Zvara, kaj finiĝis apud Hoverla — la plej alta monto de Ukrainio. (*Volodimir Hordijenko*)



Esperanto-kastelo. Vespere, la 10an de aŭgusto en Greziljono, kadre de FESTO 2011, unue koncertis la Pariza pianisto-kantisto Gijom, kaj sekvis *La Perdita Generacio* el Svedio. Ĉe la transdono de la stafeto ili faris komunan prezentadon. Sur la foto Gijomo estas malantaŭe ĉe piano. (*Flo! / Nicolas de Buyl*)

HISTORIO

DE ESPERANTO




Verkita de Aleksander Korĵenkov

Serio *Scio*. Volumo 5

Aleksander Korĵenkov. *Historio de Esperanto*
Serio *Scio*, Volumo 5
128 paĝoj, 12 eŭroj

Mi estas homo



Originalaj verkoj de
d-ro L.-L. Zamenhof

Serio *Scio*. Volumo 6

L.-L. Zamenhof. *Mi estas homo*
Serio *Scio*, Volumo 6
288 paĝoj, 24 eŭroj

HOMARANO

La vivo, verkoj kaj ideoj
de d-ro L.L. Zamenhof



Aleksander Korĵenkov

Serio *Scio*. Volumo 8

Aleksander Korĵenkov. *Homarano*
Serio *Scio*, Volumo 8
320 paĝoj, 27 eŭroj

Aleksander Korĵenkov



ZAMENHOFOLOGIO

Aktualaj problemoj kaj taskoj

Aleksander Korĵenkov. *Zamenhofologio*
Serio *Sed ne el katedro*, Volumo 5
16 paĝoj, 3 eŭroj

Mendu en via kutima libroservo